1985 majo
78a jaro
n-ro 953 (5)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando

Tria Teatra Festivalo en Budapeŝto



Vi trovos

ke la pliparto de la junia numero fariĝis la maja, tiel ke la demando, ĉu ĉi tiu numero malfruas aŭ fruas, estas iom filozofia! La kaŭzo estas la malfrua pretiĝo de la Estrara Raporto, pri kiu ne respondecas la redaktoro de la revuo. Ni esperas,ke la revuo kun tiu raporto atingos vin proksimume du semajnojn post ĉi tiu. La nuna numero estas varia, kiel preferas la redaktoro, kaj kredeble ankaŭ la legantoj. Bedaŭrinde ne troviĝis sufiĉe da spaco por pluraj lastatempaj reagoj, kiuj verŝajne aperos en la julia numero.

Enhavo

81 Estrara kunsido: Pri Jubileo, financoj, rekonstruado (G. Sutton)
71a Universala Kongreso de Esperanto, kotizoj
82 Informado: Atenton, funkciuloj! Seminario por gvidantoj de landaj asocioj (Umeda Yosimi)
Enketo pri la junularo
83 Jubileoj: *El popola Ĉinio* 35-jara (Geoffrey Sutton)
3a Teatra Festivalo en Budapeŝto: Aktoroj aplaŭdindaj pli ol tekstelekto (Stefan MacGill)
85 Kongresoj: Franc-Germana Esperanto-Renkontiĝo (Franz Josef Braun)
86 Intervjuo: Harry Harrison: sukcesa verkisto de sciencfikcio kaj esperantisto
88 Kalendaro (Renkontiĝoj, kongresoj, seminarioj, kursoj ktp.)
89 Lorenz Friis 1904-1985
90 Kongresa komuniko (novaĵoj pri la 70a Universala Kongreso)
91 Recenzoj: *Molekuloj* de János Nyilasi (W.J. Nijveld); *40 vidindaj lokoj en Ĉinio* (E.V. Tvarožek); *La mezepoka periodo* Gaston Waringhien (L.H. Knoedt)
93 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri la Internacia Lingvo)
95 TEJO-paĝo: Unispace, IJJ kaj Esperanto (Amri Wandel)
96 Loke – Fake – Persone (mallongaj novaĵoj)
98 Oficiala informilo de la Centra Oficejo de UEA
Nekrologoj
99 Anoncetoj
100 Esperanto en radio

La kovrilo

montras scenojn el la 3a Teatra Festivalo en Budapeŝto (vd. paĝojn 83 kaj 84). Supre: Péter Kertész kaj aktoro, kies nomon ni ne sukcesis akiri, prezentas *Betonterapio.* Sube maldekstre: Kati Berek, Zoltán Gera kaj Zsuzsa Szilágyi, nomoj konataj al hungaraj teatroamantoj, rolas en *La damo de l' fatalo.* Sube dekstre: La malfermo de la konferenco pri publika klerigado, kiu okazis paralele kun la teatra festivalo. Dudeko da referaĵoj skizis la evoluon kaj strukturon de popola kaj plenkreska edukado en pluraj landoj. (Fotoj: Zoltán Fejér.)

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).
Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Voĉlegata por blinduloj.

Redaktoro: Geoffrey Sutton.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 44; US $ 18; GM 39; enoj 3300 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 400, 1/2 p. 740, 1/4 p. 400, 1/8 p. 240, 1/16 p. 150. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakovrilaj anoncoj kostas duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Banko: Bank Mees & Hope, Postbus 749, NL-3000 AS Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:
ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto (financo, administrado): s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto (esploroj, rilatoj kun UN): d-ro Humphrey Tonkin, Office of the President, State University College, Potsdam, NY 13676, Usono; ☎ (315) 265 6744.

Vicprezidanto (informado): s-ro Umeda Yosimi, Aobadai 2-15-10, Meguro-ku, Tôkyô, 153 Japanio.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23 274.

Estrarano (planado, Jubilea Jaro, landa agado): d-ro Renato Corsetti, Colle Rasto, I-00039 Zagarolo, Italio; ☎ (06) 95 25 713.

Estrarano (eksteraj rilatoj, junularo): d-rino Barbara Despiney, 35 rue Maurice Ténine, F-94260 Fresnes, Francio; ☎ (1) 237 14 73.

Estrarano (kongresoj): s-ro Roland Lindblom, Stenbockens gata 109, S-136 62 Handen, Svedio; ☎ (08) 777 41 75.

Estrarano (kulturo, edukado): s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Estrarano (faka agado, aplikado de Esperanto): inĝ. Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Maandelijks tijdschrift "Esperanto", nr. 953 (5), mei 1985. Verantwoordelijke uitgever: G. Maertens, Pr. Leopoldstraat 51, B-8310 Brugge.

Pri la Jubileo, financoj, rekonstruado...

La Estraro de UEA kunsidis de la 20a ĝis la 22a de aprilo en Roterdamo. De la naŭ estraranoj nur Petâr Todorov ne povis ĉeesti pro grava malsano en la familio.

Multan tempon la Estraro dediĉis al la **financa stato** de la Asocio kaj al la buĝetpropono por la venonta jaro (vidu la plenajn detalojn en la junia numero). Kvankam la nunaj spezoj de la Asocio estas multe pli grandaj – pro la pli ampleksa agado – la ja zorgiga deficito de 1984 estas 15% de la elspezoj, kiu estas proporcie malpli granda ol estis negativaj saldoj antaŭ deko da jaroj.

La Estraro decidis, ke la paĝnombro de la **Jarlibro** por 1985 reduktiĝu ĝis 352 paĝoj, kiun la membroj ricevu kiel eble plej frue antaŭ la UK. La Estraro decidis akcepti la peton de Akademio de Esperanto por 1 100 gld., kiun sumon UEA transpagos el la Propaganda Konto.

De la Komisiono por Financoj kaj Administrado kaj estrara komisiono de TEJO venis teksto de **nova Regularo de TEJO**. La Estraro longe diskutis kaj proponis plurajn ŝanĝojn en la Regularo, kiun prezentis nome de TEJO ties kasisto, Alex Humet. Eventualaj modifoj al la proponita teksto, farotaj en la 41a Internacia Junulara Kongreso de TEJO en Eringerfeld, estos komunikitaj al la Komitato de UEA por plutrakto en Aŭgsburgo.

André Staes, administranto de la Jubilea Jaro prezentis skizan raporton pri la agado. Por starigi la **Internacian Patronan Komitaton por la Centjara Jubileo**, la Estraro akceptis la jenan proceduron: 1) la prezidanto de UEA invitos membrojn de Honora Patrona Komitato de UEA kaj antaŭajn Altajn Protektantojn de Universalaj Kongresoj; 2) oni presigos apartan leterpaperon kun listo de la nomoj de la unuaj anoj de la Internacia Patrona Komitato; 3) landaj kaj fakaj asocioj liveru proponojn al UEA pri ceteraj kandidatoj kaj 4) UEA ellaboros strategion kiel aliri la taŭgajn proponitojn. UEA kiel eble plej baldaŭ sendos al la landaj kaj fakaj asocioj Esperantan version de broŝuro kaj letero, por ke ili traduku ĝin nacilingven. Esperanta kaj angla versioj jam ekzistas.

La Estraro aprobis la jenajn kriteriojn kaj principojn por enpreno de proponitoj en la Internacian Patronan Komitaton:

Kandidatoj estu invititaj nur post interkonsento pri ilia taŭgeco inter UEA kaj la landaj asocioj. Neniu estu invitita, pri kiu UEA aŭ la landa asocio kompetenta havas dubojn.

La kandidatoj estu personoj internacie konataj, ekzemple sur la kampoj de kulturo, scienco, edukado, politiko, komunikado, sporto ks.

Se doni ekzemplon de la nivelo, oni konsideru, ke nacia ministro tute nekonata eksterlande ne taŭgas. Ankaŭ politikistoj de lokaj (komunumaj, provincaj) instancoj principe ne taŭgas.

Taŭgas ŝtatestroj (ankaŭ se internacie malmulte konataj), Nobel-premiitoj (ankaŭ se relative nekonataj) kaj verkistoj kun monda famo.

La Estraro kontrolis la staton de la ampleksaj **rekonstruadoj** en la Centra Oficejo. La ĉefa laboro nun okazas en la teretaĝo, kie oni baldaŭ konstruos novajn ejojn por la Libroservo. Post la estrara kunveno ni sukcesis avantaĝe aĉeti la tutan ekipaĵon de bankrotinta librovendejo. Oni esprimis la esperon, ke la teretaĝaj laboroj estos pretaj ĝis julio 1985. Sekvos aliaj laboroj en la supraj etaĝoj. La rekonstruoj ankoraŭ dum ne mallonga tempo negative influos la normalajn funkciojn de la Centra Oficejo. Tio montriĝas en malkresko de vendoj de la Libroservo, do la Estraro diskutis kiel altigi ties vendojn dum la resto de la jaro.

La Estraro decidis ĉiujare honori unu aparte aktivan membron de la Komitato de UEA, kiu per sia laboro estas modelo de **efika komitatano**. Por la nuna jaro la ĝenerala sekretario jam petis proponojn de la komitatanoj. Laŭ la regularo, kiu validos por la venontaj jaroj, la kandidatigoj kun resuma motivigo devos atingi la Estraron ĝis la 31a de marto. Deĵoranta estrarano ne rajtas elektiĝi. Oni ĉiujare anoncos la rezulton en la Universala Kongreso.

Rilate la **71an Universalan Kongreson** en Pekino, la Estraro fiksis la bazan kotizon de la unua regula kotizperiodo je 150 gld. (Kat. 2), kiu sekvos la nunan favoran kotizon de 120 gld., validan ĝis la 16a de aŭgusto. La temo de la Kongreso estos "Interkompreniĝo, paco, evoluo".

Pro la forpaso de d-ro Sinoda, la Estraro nomis **novan ĉefdelegiton por Japanio**. Li estas prof. Yamsaki Motohiro.

Geoffrey Sutton

71a UNIVERSALA KONGRESO

Pekino, Ĉinio, 26 julio - 2 aŭgusto 1986

Ĝis la 15a de aŭgusto 1985 profitu de la favora tarifo!

Jen la kotizoj en nederlandaj guldenoj:

	ĝis: 15 aŭg.	31 dec. 85
Kat. 1 (ne membro de UEA)	150 gld	187,50 gld
Kat. 2 (individua membro de UEA)	120	150
Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA)	90	112,50
Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA)	60	75

Atenton, funkciuloj! Seminario por gvidantoj de landaj asocioj

Por efektivigi komitatajn rezoluciojn akceptitajn en Vankuvero, la Estraro de UEA nun invitas reprezentantojn de ĉiuj landaj asocioj de UEA partopreni en la Seminario por Gvidado kaj Informado en Aŭgsburgo, la 31an de julio kaj 1-an de aŭgusto.

Gvidado de la Esperanto-movado sur la landa nivelo estas grava elemento ankaŭ por la internacia movado, precipe ĉar sur tiu nivelo la movadon partoprenas esperantistoj kiel volontuloj, kiuj ne ĉiam estas spertaj kaj trejnitaj por disvastigi ideojn pri lingva egaleco en internaciaj rilatoj.

Informado estas sendube unu el la kolonoj de ĉia agado por Esperanto. Same senduba estas la fakto, ke la plimulton de la informa laboro oni faras sur landa nivelo en nacia lingvo.

Pro la supraj du konstatoj la granda respondeco kuŝas sur la ŝultroj de la gvidantoj kaj funkciuloj de la landaj asocioj, kiuj kutime havas la taskojn pretigi gvidliniojn kaj informilojn, kiujn la membroj uzas por interesi eksterstarantojn.

Konsiderante tion, kaj sekvante la komitatajn rekomendojn okazigi tiurilatajn seminariojn, la Estraro de UEA decidis organizi la seminarion por gvidaj funkciuloj de la landaj asocioj dum la merkredo kaj ĵaŭdo antaŭ la kongresa semajno. Tiamaniere ankaŭ la komitatanoj, kiuj intencas partopreni la seminarion, estos liberaj partopreni la komencajn komitatajn kunsidojn dum la vendredo. En la vespero de tiu tago, la 2a de aŭgusto, okazos la bankedo por la komitatanoj.

La temoj de la seminario estas tre ĝeneralaj: 1) Kiel gvidi la landan Esperanto-movadon subtenatan de volontuloj? 2) Kiel informi pri Esperanto al eksterstarantoj precipe en la medioj amaskomunikaj kaj specifaj?

Oni povas pritrakti la temojn el pluraj vidpunktoj. Ĉiu partoprenanto havos eblecon ion kontribui. Tio ne signifas, ke la seminario estos nestrukturita aranĝo, ĉar oni antaŭvidas serion da prelegoj pri difinitaj temoj, kun postaj debatoj.

Ni insiste petas ĉiujn landajn asociojn, ke ili bonvolu sendi al ĉi tiu seminario almenaŭ unu el siaj gvidaj funkciuloj, por ke la reprezentiĝo ne estu hazarda.

Ni ankaŭ insiste petas, ke ĉiu reprezentanto kunportu mallongan raporton pri tio, kion oni faras en la koncerna lando pri gvidado kaj informado, kaj eble ankaŭ ekzemplerojn de tiurilataj presaĵoj.

La gvidado de landaj asocioj kaj la ekstera informado estas du el la absolute gravaj agadoj en la Esperanto-movado, do la Estraro de UEA atendas fortan interesiĝon de ĉiu aktiva asocio, kiu laboras sur landa nivelo. Esenco de la Esperanto-movado estas okazigi internacian kunlaboron, kaj estas certe, ke ĉiu landa asocio povas ion instrui al kaj lerni de aliaj.

Kaj ĉiam sekvante komitatan rekomendon, ni petas vin trovi la manieron subvencii la vojaĝon de taŭga reprezentanto, se iu tia ne jam planas partopreni la Universalan Kongreson en Aŭgsburgo.

Por la Estraro de UEA,
Umeda Yosimi, vicprezidanto

Enketo pri la junularo

La esplorgrupo pri socia psikologio ACRE, ĉe Universitato de Clermont-Ferrand, Francio, deziras ekscii, kiel hodiaŭaj gejunuloj (ĉirkaŭ 16- ĝis 30-jaraj) tra la mondo prezentas al si sian socion kaj kiel ili vidas la sociajn rilatojn. La esplorgrupo aparte pensas pri la Esperanto-movado, ĉar ĝia junularo estas preskaŭ tutmonda, kaj la grupo atendas de ĝi tre diversajn respondojn.

Samtempe la esperantistoj eventuale estas specifaj, skribas ACRE. En ĉiu medio iuj individuoj estas aparte rimarkataj. Iufoje oni admiras, alifoje oni timas, envias, kompatas aŭ malestimas aliulojn...

Iuj distingas unuopulojn ĉie sammaniere. Aliaj observas malsame, depende de tio, ĉu ili estas en sia laborloko, en sia familio, sportantaj aŭ babilantaj kun amikoj.

La grupo petas reagojn al la sekva enketo. Ili certigas diskretan uzon de la respondoj, kaj publikigos la rezultojn. Ili esperas, ke la respondoj kondukos ilin al pli precizaj demandoj. Se oni deziras, oni povas respondi sen nomo kaj adreso:

1. Kiajn individuojn oni rimarkas?
2. Kio en via unua respondo dependas de la medio?
3. Ĉu (kaj se jes, kiel) la epoko influas la reagon de la homoj?
4. Ĉu la gejunuloj sekvas la maljunulojn aŭ kondutas alie?
5. Kio okazas al tiuj, kiuj ŝajnas malsamaj?
6. Ĉu ekzistas "esperantistaj" agmanieroj, aŭ ĉu la esperantistoj reagas kiel aliaj anoj de la medio?

Bonvolu aldoni informojn pri viaj sekso, aĝo, profesio kaj loĝlando, kiel ankaŭ kiel vi eksciis pri la enketo. La adreso por la respondoj estas: ACRE, 292 Bd. des Bressons, F-13300 Salon de Provence, Francio.

El popola Ĉinio 35-jara

En majo 1950 aperis la unua numero de la gazeto *El popola Ĉinio*. Tiam ĝi havis la subtitolon "Monata informa bulteno eldonata de Fremdlingva Eldonejo". Tiu unua numero ne aspektis kiel la nunaj. Ĝi estis ok-paĝa, grandformata gazeto kun nigra-blankaj gra-

EL POPOLA ĈINIO

EN TIU CI NUMERO

AL LA LEGANTOJ

Maja Tago En Popola Ĉinio

Jen la teknika evoluo de *El popola Ĉinio*, de simpla inform-bulteno en 1950 al la nuna luksa gazeto.

vuraĵoj. La dua numero enhavis tutpaĝan artikolon pri "Esperanto en Ĉinio", verkitan de Tikos kaj Giani. Ili skribis i.a.: "Ĉar Ĉinio estis duonfeŭda kaj duonkolonia lando, la vastaj popolamasoj... eĉ ne havis la eblon lerni legi sian patran lingvon, des malpli lerni la internacian lingvon Esperanto." El tiu pasinteco komenciĝis la nova Esperanto-movado en Ĉinio.

En 1952 *El popola Ĉinio* havis 24 paĝojn, pli-malpli en la nuna formato. Ĝi prezentis sociajn kaj politikajn artikolojn laŭ la vidpunkto de la ĉina registaro kaj erojn el la ĉina kulturo kun desegnaĵoj kaj kvar paĝoj da nigra-blankaj fotoj.

En la numero de decembro 1953 aperis preteksta adiaŭo, kiu anoncis la malaperon de la gazeto. Dum la sekvaj tri jaroj la politikaj kondiĉoj tamen sufiĉe aliiĝis, por ke *El popola Ĉinio* reaperu en 1957. Dumonata, 36-paĝa kaj eldonata de Ĉina Esperanto-Ligo, ĝi ricevis novan karakteron, kiu donis "decan lokon al [la] Esperanto-movado en Ĉinio". La teknika nivelo de la gazeto daŭre altiĝis. Ĝi jam estis la sola gazeto en Esperanto kun kolora kovrilo, kaj en 1963 aperis koloraj paĝoj ankaŭ interne.

De 1967 la gazeto komencis aperi monate, sed la enhavo estis plene dediĉita al la tiama t.n. "Kultura Revolucio", kio kaŭzis perdon de multaj eksterlandaj abonantoj. La Esperanto-movado ne povis aktivi nek ricevis spacon en la gazeto. Sed post la fino de la dek fermitaj jaroj de tiu "revolucio" okazis reago, kiu kondukis al pli malferma Ĉinio. Denove ekgvidis la redakcion de *El popola Ĉinio* esperantistoj. Nun aperas ne nur informoj pri la enlanda movado, sed ankaŭ pri Esperanta agado en eksterlando, kiel ankaŭ foje rimarkindaj artikoloj de eksterlandaj esperantistoj.

El popola Ĉinio spertis la ŝanĝiĝojn de la enlanda klimato, sed dum la plimulto de siaj 32 jaroj de apero ĝi vaste utilis al la Esperanto-movado. La daŭra publikigo de popularaj artikoloj pri sociaj kaj sciencaj temoj sendube grave kontribuis al la ĝenerala altigo de la lingva nivelo de esperantistoj tra la tuta mondo. Ne estas ĉi tie la loko diskuti pri la celo de la gazeto, pri kio certe ekzistas diversaj opinioj, kaj ĉirilate memorindas, ke jam de kelkaj jaroj la ĉina Esperanto-movado havas sian propran gazeton, *La mondo*. La nura fakto, ke *El popola Ĉinio* estas plenkolora gazeto en Esperanto – nun kun ankoraŭ pli da koloraj paĝoj ol antaŭe – signifas, ke ĝi ofte formas centran punkton en Esperantaj ekspozicioj.

La ĉinaj esperantistoj, kiuj tra la jaroj laboris kaj laboras por *El popola Ĉinio* meritas gratulojn kaj bondezirojn de la tuta esperantistaro, ĉar necesis persisto kaj spito tra malfacile imageblaj spertoj por aperigi gazeton, kiu per sia nura ekzisto petegas, ke esperantistoj en aliaj landoj utiligu ĝin kiel ekzemplon. Parte pro tiu ekzemplo nun aperas unu alia plenkolora gazeto en Esperanto. La eldonantoj, Ĉina Esperanto-Ligo kaj la Fremdlingva Eldonejo, komprenas la rolon kaj potencialon de la Internacia Lingvo. Kial aliaj, en aliaj landoj, ne estas tiel bone informitaj?

Geoffrey Sutton

3a TEATRA FESTIVALO EN BUDAPEŜTO

Aktoroj aplaŭdindaj pli ol tekstelekto

Por la plimulto de la deko da prezentoj, kiuj konsistigis la 3an Teatran Festivalon en Hungario, restis neniu libera loko en la 200-sidloka Teatro Radnóti, meze de Budapeŝto.

La stiloj gamis de la tradicia ĝis la absurda. Tiu lasta prezentiĝis per *Betonterapio*, la dua originala verko de János Elem. Kiel diktas la ĝenro, pli fortis la stilo ol la enhavo; la du aktoroj kun viglo kaj detruemo instruis al ni la konkretan kuracmetodon.

Interpretis refoje la monodramon de Franz Kafka *Letero al la akademio* Kálmán Szabó. Sian finan efikon ĝi gajnis (simile kiel *La forpasinto* el la pariza festivalo, vidu en *Esperanto*, jan., p.5) per neatendita forpreno de la teatra kostumo, por abrupte rompi la

cedon de real-postulo, kiun pretas doni ĉiu teatra spektantaro.

La pupteatran arton ni ĝuis en surscenigo de *Johano la Brava*, laŭ Sándor Petőfi. La kolor- kaj

Foto: Zoltán Féjer

Kálmán Szabó plurfoje imponis esperantistan publikon per dramoj. Ĉi tie, demetinte la simiomaskon, li fermas la verkon de Kafka: *Letero al la akademio.*

agplena prezentaĵo impresis ĉarme kaj impone, certe por spektinto el nenajbara lando, kie tiu artformo ne estas tiel disvastigita.

El ĉiuj ĝenroj la komedia plej forte reprezentiĝis, per du plenlongaj prezentaĵoj. La unua estis *La milionulo*, verkita de Jordan Jovkov en 1930. Ĉefrolis Belka Beleva kaj Anani Anev. Gertruda Lukanova havis la malfacilan taskon reĝisori dramon, en kiu kelkfoje preskaŭ ĉiuj dek du roluloj moviĝis surpodie sammomente. Ĝia temo estis geedziĝo pro financaj motivoj, sed en kunteksto apenaŭ plu aktuala. Tiun temon reprenis en nur iom pli aktuala formo *La damo de l' fatalo* de la hungaro László Tabi. Ĉi tie pozitive aldoniĝis ekstra dimensio pro mortoj (mortigoj?) en suspektendaj cirkonstancoj, kio helpis teni la atenton ĝis la fino. La eldonita teksto epitetis la verkon "tragikomedio". Estis tamen malfacile akcepti la verkon je tragedia nivelo, ĉar temis maksimume pri komedio kun iom da mister-strecо. La aktoroj – kelkaj nacie konataj en Hungario – vigle laboris por tiri ĉion eblan el la teksto.

Fermis la kvin-tagan festivalon je la 26a de marto revua prezento de la aktoroj. Muzikajn, skeĉajn kaj deklamajn erojn kunligis Vilmos Benczik per subtila sprito.

Kion resume verdikti? La ĝenerala opinio rikoltebla vestible, estis, ke ĉi tiu festivalo ne superis kvalite la antaŭan. Iom zorgige, ĉar simile oni konkludis fine de la pariza festivalo. En Budapeŝto malmultaj eksterlandanoj spektis, surpodiis nur hungaroj kaj bulgaroj. En Parizo ludis nur francoj. Kostas eksporti teatraĵojn trans kulturajn limojn, sed finfine tio devas esti kerna celo de la Esperanto-teatro!

La problemo ne kuŝas ĉe la aktorado; la senduba triumfo de la budapeŝtaj festivaloj estas ilia kapablo konvinki konatajn profesiajn aktorojn kaj reĝisorojn investi tiel grandskale en Esperanto, eĉ por unufoja prezento. Pli bonan aktoran talenton kaj lingvo-uzon oni apenaŭ trovos aliloke.

La baza problemo estas la elekto de aktualaj tekstoj. *La milionulo* havas certan historian intereson, sed ĝi apenaŭ komunikas mesaĝon por la hodiaŭa vivo. Ĝin kaj *La damo de l' fatalo* ni devis akcepti je distra nivelo. Eĉ la "avangarda" verko de Kafka datiĝas el la komenco de la jarcento, kaj la absurdismo dividas kun ni la mondon dum dudeko da jaroj. Ni ne malestimu ĉi tiujn kaj tiajn tekstojn, sed oni aldone sopiras al tekstoj de la nivelo de *Inuk* (prezentita dum la islanda Universala Kongreso en 1977) aŭ *Kataki* (tokia Universala Kongreso en 1965) – teatre imponaj, stile modernaj, kun profundaj, kortuŝaj kaj universalecaj mesaĝoj. La mondo ankoraŭ ne seniĝis je gravaj problemoj kaj homaj tragedioj. La Esperanto-teatro foje kuraĝu fari enhave kaj teatre validajn komentariojn pri tiaj temoj.

Ĉu ĝis la Centjara Jubileo ni sukcesos ligi pli kuraĝan teksto-elekton – kiun ni foje spertas ĉe Lagrange kaj la parizanoj – kun la riĉa aktora potencialo konstatebla en Budapeŝto? Se jes, eĉ la ducent sidlokoj ĉe Teatro Radnóti ne sufiĉos por la kvara aŭ kvina festivalo.

Stefan MacGill

Betonterapio/Betonterápia, János Elem. El la hungara trad. Péter András Rados. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 35p. 21cm. ISBN 963 571 155 7. Prezo: 6,00 gld.

La damo de l' fatalo: Tragikomedio, László Tabi. El la hungara trad. Vilmos Benczik. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 43p. 21cm. ISBN 963 571 154 9. Prezo: 6,60 gld.

Franc-Germana Esperanto-Renkontiĝo

"Esperanto vivas. Kaj ĝi sonas tiel nature kiel normala nacia lingvo", skribis loka ĵurnalo post la Franc-Germana Esperanto-Renkontiĝo, kiu okazis de la 29a ĝis la 31a de marto en Rastatt, FR Germanio, kun partopreno de pli ol 130 personoj, ne nur el Francio kaj FR Germanio. La sukcesan renkontiĝon oni multe laŭdis. Tion oni taksu des pli alte, ke la Esperanto-grupo de Rastatt estas tre juna kaj unuafoje okazigis tian kongreseton. Al la sukceso kontribuis la agrabla etoso en la Dioceza Klerigdomo Sankta Bernardo, kiu pruviĝis taŭga kiel kongresejo, "hotelo" kaj "restoracio". Menciinda estas la multflanka subteno de la urba administracio kaj tute aparte la persona aktivado de la urba junularprizorgisto, Horst Jochim, kiu kunorganizis la ampleksan programon por la gejunuloj.

Grandaj afiŝtabuloj en la urbo atentigis pri la okazaĵo kaj montris la vojon. En la malfermo salutis nome de Baden-Virtemberga Esperanto-Ligo (BAVELO) ties prezidanto, s-ino Helga Windisch, kaj en la nomo de la Esperanto-grupo de Rastatt Horst Fischer. La prezidanto de la orientfranca Esperanto-organizaĵo, Edmond Ludwig, interalie akcentis ke la Internacia Lingvo antaŭ ĉio interligas homojn. La ĉefurbestro de Rastatt, Franz Josef Rothenbiller, esprimis ĝojon, ke la renkontiĝo okazas en lia urbo. Tie, proksime al la franca landlimo, oni ne ĉiam serioze praktikis la lernadon de la lingvo de la najbaro, sed "via lingvo estas pli grava kaj pli ampleksa afero", li deklaris. Li krome reliefigis la tradukon de la urba prospekto de Rastatt en Esperanton, faritan de Horst Fischer, kiun li pro tio honoris per enmanigo de la urbmedalo. Salutis la ĉeestantojn ankaŭ la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (GEA), Helmut Klünder.

Ĉefpunkto de la jarkunveno de BAVELO estis statutoŝanĝo pro tio, ke GEA enkondukis novan formon de subtenanta kaj senkotiza membreco (vd. *Esperanto*, p.107/1984). Tiucela varbado komencis alporti unuajn fruktojn. Plia grava temo estis "Esperanto kaj la lernejo", ligita al agado por akiri pli da instruistoj por Esperanto, en la konscio pri la fakto, ke ili estas ŝlosilo por pli akcela disvastigo de la lingvo. La dua tiucela lernsemajno, aranĝata de BAVELO, okazos komence de oktobro en Aidlingen. Interesitoj povas skribi al s-ro F.J. Braun, Hornisgrindestr. 8, D-7580 Bühl 16, FR Germanio.

Por la kunsidoj de la unuopaj fakgrupoj (instruistoj, natur-amikoj, katolikoj, junularo) oni rezervis la dimanĉan posttagmezon. En la enirhalo de la kongresejo estis ekspozicio pri Kooperativa Esperanto-Movado. Alia ĉambro estis tute plena de tabloj kun Esperanto-literaturo. Inter la distraj programeroj estis ekskursoj kaj prezentado de la franca kanzonisto Ĵak Le Puil. La ĉirkaŭ 30 gejunuloj el ses nacioj havis grandparte propran programon. Ili i.a. disdonis varbmaterialon en la urbo, ekzercis popoldancojn kun anoj de la junulara organizaĵo Schreber-Jugend kaj, kvazaŭ kontribuo al Internacia Junulara Jaro, ili diskutis generaciajn problemojn inter plenkreskuloj (superuloj) kaj gejunuloj kaj problemojn de la infanoj de eksterlandaj laboristoj en FR Germanio kaj Francio. Posttagmeze ili i.a. ekskursis bicikle al la palaco Favorite. La finan punkton metis la baden-vurtemburga junularo per fondo de oficiala junulara organizaĵo "BAVELido". La fondkunvenon ĉeestis raportistino, Martina Grothe, de Südwestfunk (Sudokcidenta Radiostacio), kiu elsendis pri la renkontiĝo en sia programo *Radiotreff am Nachmittag* (Posttagmeza radio-rendevuo) la 4an de aprilo.

Franz Josef Braun

Foto: Jovan Ošap

Harry Harrison: sukcesa verkisto de sciencfikcio kaj esperantisto

Harry Harrison estas unu el la plej produktivaj kaj sukcesaj verkistoj de sciencfikcio en la angla lingvo. Li naskiĝis en 1925 en orienta Usono, laboris kiel komerca artisto, artdirektoro kaj redaktoro, antaŭ ol komenci sian sendependan verkistan karieron. Li ricevis multnombrajn premiojn kaj honorojn. Dum pluraj jaroj li verkis la konatan bildstrion pri Flash Gordon. Harrison estas interesa por esperantistoj ne nur ĉar li mem estas konvinkita esperantisto, sed ĉar li en preskaŭ ĉiu sia romano mencias Esperanton. Tiel li dum jardekoj allogis milojn de siaj legantoj scivoli kaj peti pliajn informojn pri la lingvo.

Konata heroo de Harrison estas "The Stainless Steel Rat" (la Korodimuna Ŝtalrato), kiu alportis al serio de romanoj tute apartan humuron. La sekva ekzemplo de humura stilo de Harrison venas el lia verko The Stainless Steel Rat Wants You! *(La Korodimuna Ŝtalrato deziras vin!, Toronto, 1979; p.37), en kiu invadas aroj da naŭzaj, ŝlimaj, malbonodoraj, mensosuĉaj estaĵoj de nekonata planedo:*

"Mi solvos ĉiujn viajn problemojn por vi, kiel mi faris en la pasinteco, sed mi devas peti vian helpon por tio. Kiom da diversaj specioj de eksterteranoj vi jam malkovris?"

"Tricent dek du. Sed kial...?"

"Mi diros al vi post momento. Ĉiuj grandecoj, formoj kaj koloroj?"

"Nepre kredinde! Vi devus vidi miajn ĥimerojn."

"Ne, dankon. Vi sendube malkovris la lingvon, kiun ili uzas por komuniki unu kun la aliaj. Ĉu ĝi estas malfacila?"

"Vi jam parolas ĝin. Ĝi estas Esperanto."

"Ne blagu, Kojpu!"

"Ne kriu al mi tiutone!" li diris histerie. Poste li sukcesis ekregi sin, glutis pilolon kaj tremis. "Kial ne? Ili evidente observis nin dum longa tempo, lernante ĉion pri ni, antaŭ ol ili invadis. Ili tiel aŭdus multajn el niaj lingvoj, poste decidis favore al Esperanto kiel la plej simpla, facila kaj plej efika formo de komunikado, ĝuste kiel ni faris."

"Vi konvinkis min. Dankon, profesoro."

Geoffrey Sutton: *Vi nun loĝas en Irlando. En kiuj aliaj landoj vi loĝis, krom en via naskiĝlando, Usono?*
Harry Harrison: Mi iris al Meksikio en 1956, ĉar mi volis sendependiĝi kiel verkisto. Jaron poste mi iris al Britio, poste Italio, kaj kiam mi vendis mian unuan libron, al Danlando en 1959, ĉar mi verkis artikolojn por dana revuo. Ni intencis pasigi unu monaton tie, sed restis sep jarojn. Ĝi estas belega lando por infanoj. Ni tiam havis unu ĵus naskitan infanon. Tie niaj junaj infanoj komencis paroli la danan.
Sutton: *Vi menciis, ke vi vendis vian unuan libron.*
Harrison: Mi vendis ĝin kiel felietonon al la gazeto *Astounding Stories* (Mirigaj historioj). Komprenu, ke en la kvindekaj jaroj tute ne aperis libroj de sciencfikcio. Verko povis aperi nur kiel gazeta felietono. Mi vendis ĝin al la gazeto kontraŭ 2 100 usonaj dolaroj, dum mi vivtenis min per tri mil dolaroj jare. Poste, kiam oni komencis eldoni specialajn poŝlibrojn, mi vendis verkon kiel poŝlibron. Tiu estis *Deathworld* (Mortomondo) en 1960 aŭ 1961. Post tio mi komencis verki kaj vendi unu libron jare, ĉiun jaron. Ĉiam unue al gazeto. Sed en Britio oni kutimis proponi 50 ĝis 100 pundojn por libro. Sekvus post tio trijara tantiemo de tia nekredebla sumeto kiel du pundoj, sep ŝilingoj kaj ses pencoj!

Poste ni reiris al Usono, ĉar mi opiniis, ke la infanoj devus vidi sian propran landon. Ili jam parolis la anglan kun dana akcento. Sed mi ne povis toleri la vivon tie, do mi reiris al Britio... poste al Irlando.
Sutton: *Kial allogis vin ĝuste la sciencfikcio?*
Harrison: De la aĝo de kvin jaroj mi estas leganto de sciencfikcio. Post la milito mi studis grafikan arton kaj mi tiel ŝatis sciencfikcion, ke mi ilustris por ĝi librokovrilojn kaj gazetojn. Dum tiu tempo mi ekkonis la redaktorojn.

Foto: Jerry Bauer



Harry Harrison verkis jam 33 romanojn. Multaj el ili enhavas propagandon por la Internacia Lingvo.



Du libroj el la sciencfikcia verkaro de Harrison: *In Our Hands the Stars* (En niaj manoj la steloj; Londono 1981) kaj germana traduko *Macht Stahlratte zum Präsidenten!* (Faru ŝtalraton prezidanto!, Munkeno 1984).

Sutton: *Ĉu vi aŭtoris alispecajn verkojn?*
Harrison: Mi verkis 33 romanojn. Tiuj, kiuj ne estas sciencfikciaj estas elĉerpitaj, do ĉirkaŭ 31 estas nun aĉeteblaj. Mi verkis diversspecajn krimromanojn, ankaŭ la libron *Stonehenge*, kun amiko-antropologo, pri la demando, kiuj konstruis tiun prehistorian ŝtonaron en suda Anglio kaj kial. Mi verkis ankaŭ multe da sciencfikcio por gejunuloj, kiu tre kontentige vendiĝas.
Sutton: *Vi estis la unua prezidanto de Monda Asocio de Verkistoj de Sciencfikcio. Ĉu vi povas diri ion pri tio?*
Harrison: En internacia kunveno de sciencfikciaj verkistoj mi proponis, ke ni fondu oficialan organizaĵon, ĉar tiaj renkontiĝoj kutime estas nur por legantoj. Ĝia oficiala nomo estas World SF (Monda sciencfikcio), kaj ĉiaj profesiuloj en iu ajn branĉo de la sciencfikcio povas aliĝi. Ĝi estas tre internacia organizaĵo kun ĉirkaŭ 200 membroj, sed sciencfikcio estas usona inventaĵo. Ekzistas alinacia sciencfikcio, sed ĝi ne estas tiel populara kiel la usona. Mi proponis, ke oni uzu Esperanton, sed ĉiuj kriis "La angla, la angla", ĉar ili jam uzis tiel multe da tempo por lerni ĝin.
Sutton: *Kiel vi unue renkontis Esperanton?*
Harrison: En la armeo. Mi havis tre tedan okupon kiel artileria instrukciisto en Teksaso dum la Dua Mondmilito. Varmegaj tagoj, ĉirkaŭ 50 gradoj celsiusaj, kun kanonoj pafantaj, duonsurda en ambaŭ oreloj. Tute enuige! Do de armeano, kiu estis esperantisto, mi aĉetis 27-lecionan lernolibron. Sekve, en 27 semajnoj mi lernis Esperanton en la armeo! Mi korespondis, sed mi ne aŭdis eĉ unu parolatan vorton ĝis post la milito en Novjorko.
Sutton: *En kiom da ekzempleroj kutime aperas viaj verkoj?*
Harrison: Mi ĝojas, ke la nombro altiĝas ĉiujare. Se doni unu ekzemplon de romano pri la Korodimuna Ŝtalrato, cent mil ekzempleroj en Usono kaj po dek mil en Britio kaj FR Germanio. De mia nova libro *West of Eden* (Okcidente de Edeno), kiu nun furoras, la publiko aĉetis 38 000 binditajn ekzemplerojn, do mi antaŭvidas broŝuritan eldonon de miliono aŭ duonmiliono da ekzempleroj... kaj tio vere ŝanĝas la vivon de verkisto.
Sutton: *Kaj en kiom da lingvoj aperis tradukoj de viaj verkoj?*
Harrison: Dudek unu. Nur du en Esperanto. La pasintan Zamenhof-tagon Esperanto-Asocio de Irlando eldonis la tradukon *La verda estonteco*, kiu estas novelo de ĉirkaŭ 20 paĝoj.
Sutton: *Via verko* Make Room, Make Room *(Faru spacon, faru spacon!) fariĝis la filmo* Soylent Green *(Soja verdaĵo), en kiu rolis i.a. Charlton Heston. Ĉu vi ŝatus iom rakonti pri tio?*
Harrison: Nu, ĝi temas pri la diferenco inter etoso kaj etiko – oni povas ŝanĝi sin, kvankam oni ne povas ŝanĝi la aliajn. Mi estis konscia, ke ni frontos problemon de tro granda loĝantaro kaj manko de nafto. Ĝi estas tre realisma romano, ne tre sciencfikcia, pri la kolapsinta socio de Novjorko en la jaro 2000. La filmkompanio MGM trovis ĝin, sed volis enmiksi kaniba-

lismon! Tio donas ideon pri la funkcio de la mensoj de film-reĝisoroj! Mi laboris kun la reĝisoro kaj provis formi la filmon. Mi dirus, ke ĝi estas duone sukcesa.

Sutton: *Mi aparte ĝuis vian libron* In Our Hands the Stars *(En niaj manoj la steloj), kiu priskribas i.a la problemojn, kiujn frontas malgranda nacio – la dana, kiu neatendite akiras antaŭiran pozicion en la spacesplorado. Mi scivolas, ĉu via intereso pri la potencrilatoj inter grandaj kaj malgrandaj nacioj iel devenis de via esperantisteco.*

Harrison: Jes, absolute. La grandaj landoj kaŭzas la problemojn. Verŝajne ne la danoj komencos trian mondmiliton. Estas sceno en la libro, kie la usona kaj sovetia ambasadoj en Kopenhago frontas unu la alian trans tombejo. Tiel ili fakte situas! Kvankam miaj libroj estas aventuraj romanoj, ili ĉiuj havas ian moralan lecionon. Rilate miajn nun ses librojn pri la Korodimuna Ŝtalrato, oni komentis: "Jen Harrison denove predikas, ke oni ne mortigu homojn", kvazaŭ ne estus io malĝusta pri tio! Ili estas pitoreskaj romanoj – la kanajlo kiel heroo, sed la Rato neniam mortigas iun. Li priskribas sin kiel scienca humanisto.

Sutton: *Esperanto ŝajne ludis gravan rolon en la frua sciencfikcia movado en okcidenta Usono. Kia estis tiu rolo?*

Harrison: Estis iom da interkovro, kiam Esperanto unue venis al Usono. Legantoj de sciencfikcio interesiĝis, kaj troviĝis grupoj da legantoj de sciencfikcio kaj esperantistoj, sed la milito mortigis tion. Ĉiuj disiĝis en la armeon. Post la milito tiuj grupoj neniam rekuniĝis. Mi kaj Forrest J. Ackerman estas la solaj du el la 450 membroj de Science Fiction Writers of America (Sciencfikciaj verkistoj de Usono), kiuj parolas Esperanton.

Sutton: *Vi skribis, ke ĉi tiu intervjuo estas la unua fojo en via 42-jara verkista kariero, kiam la esperantistoj interesiĝas pri via laboro. Se oni pripensas, ke vi efike allogis al la movado multajn novulojn dum tiel multaj jaroj, kio estas via opinio pri la sinteno de la esperantistoj?*

Harrison: Ili simple estas du apartaj mondoj. Sciencfikcio estas mia profesio, kiun mi ĝuas, kaj mi de multaj jaroj entuziasmas pri Esperanto. Mi mem neniam pensis vere ligi la du. Kiam mi ricevis vian leteron, mi estis iom surprizita. Poste mi pensis, ke estus interese intervjuiĝi. Mi antaŭ multaj jaroj estis tre aktiva esperantisto. Duono de la kaŭzo eble estas tio, ke mi metas la propagandon ofte en la finon de la libro. Mi supozas, ke mi ŝajnas kabineta verkisto en la Esperanto-movado kaj kabineta esperantisto en la sciencfikcia mondo!

Sutton: *Vi konas multajn verkistojn de sciencfikcio. Ĉu vi povas diri ion pri ilia nuna sinteno al Esperanto?*

Harrison: Stulta. La angloj kaj usonanoj ne scias pri lingvoj nek interesiĝas. La eŭropanoj tamen estas iom pli internaciemaj.

Sutton: *Kia laŭ vi estos la reala estonteco de Esperanto?*

Harrison: Ĝi estas simple tro inteligenta ideo, kiel la metra sistemo, kiun la usonanoj ne deziras akcepti, sed jes la eŭropanoj. Esperanto bezonas ian grandan trarompon. La esperantistoj ĉiam ĝuos siajn kunvenojn, sed ĝi estas intelekta ideo, kaj la plimulto de la homoj ne estas sufiĉe klarvida. Mi laboros por ĝi ĝis la fino.

Sutton: *Ĉu vi kredas, ke estonta longdaŭra uzo de Esperanto povus havi influon al la funkcio de la homa cerbo?*

Harrison: Kial ne? Mi dum jaroj laboris kun komputiloj unuflanke kaj Esperanto aliflanke. Mi ege ĝojas, ke la du nun estas ligitaj en la nederlanda projekto pri distribuita lingvo-tradukado. Tio eble regos la estontecon de Esperanto. La komputila epoko ŝanĝas ĉiun faceton de nia vivo. Ĝi eble estos la plej bona afero de post la Unua Libro! La interesa afero pri komputiloj estas, ke ili estas la akra eĝo de la tranĉilo. Se io estas pli malmultekosta kaj pli rapida, tion oni uzas. Se ĝi ne sufiĉe helpos Esperanton, ĝi ja helpos la tradukadon! Sed ĝia nura ekzisto eble garantios la estontecon de Esperanto.

Kalendaro

Ĉi tiu kompletiga kalendaro ne inkluzivas la renkontiĝojn, kiuj jam aperis en la marta numero.

Tutjare

Esperantotur Benelukso havas novan adreson: Schotlandstraat 73, B-1060 Bruselo, Belgio.

Junio

01-02 Jubilea Renkontiĝo, Den Burg/Texel, Nederlando (Esperanto-Klubo, Treilerstraat 11, NL-1184 SW Den Helder)

03-07 Tagoj de Bydgoszcz, Pollando (PEA-filio Bydgoszcz, Pola Esperanto-Asocio, ul. Jasna 6, PL-00-013 Warszawa 1)

13-16 Seminario "Ekumenismo kaj Paco", Ostróda, Pollando (Pola Esperanto-Asocio, vidu 03-07)

17-23 Piedirado/tendumado, Saillans, Francio (Kresta Steló, 8 rue des Oulières, F-26400 Crest)

24-29 Esperanto-staĝo por komencantoj kaj progresantoj, La Chaux-de-Fonds, Svislando (KCE, Pf. 771, CH-2301 La Chaux-de-Fonds)

30-21 jul. Intensa Seminario, Subotica, Jugoslavio (Esperanto-Societo Subotica, Trg cara Jovana Nenada 3, YU-24000 Subotica)

Julio

07-13 2a Internacia Kataluna Esperantista Ferisemajno, Vilanova i la Geltrú, Hispanio (Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat de correus 32 318, Barcelona)

Lorenz Friis 1904-1985

La 11an de marto mortis Lorenz Friis en Århus, Danlando. Li estis instruisto, kiu dum 50 jaroj dediĉis siajn talentojn al pluraj facetoj de la instruado de Esperanto.

En 1929 li fondis la Esperanto-klubon de Åbyhøj. Du jarojn poste aperis lia unua lernolibro de Esperanto por danlingvanoj, *Esperanto lærebog*, kiu atingis jam sian naŭan eldonon. Por ĝia unua publikigo Friis mem devis pagi.

Li estis grava kunlaboranto por *Enciklopedio de Esperanto* (1933).

En 1932 li iniciatis la fondon de Dana Esperanto-Instituto, kiu kunlaboris kun lokaj grupoj por okazigi kursojn. Multaj konataj eksterlandaj instruistoj estis invititaj al Danlando. Poste la landa Esperanto-organizaĵo transprenis la Instituton. Ankaŭ en 1932 Friis aranĝis la unuan Internacian Ferian Esperanto-Kurson. Ekde 1936 la Internaciaj Feriaj Esperanto-Kursoj okazis en Internacia Altlernejo en Helsingør. Dum kvar jardekoj ili ludis elstaran rolon en la instruado de la lingvo al miloj da lernantoj el la tuta mondo.

En 1934 aperis la unua pli granda Esperanta vortaro de Friis kaj P. Frey. Kvar jarojn poste aperis la unua eldono de la granda Esperanto-dana vortaro *Store esperanto-dansk ordbog*.

Dum la 50aj jaroj estis multe da intereso pri esperantistaj grupvojaĝoj de Lorenz Friis.

Inter liaj multaj elstaraj lerniloj, kiuj ĉefe estis por danoj, troviĝis la popularaj kursbroŝuroj por internacia uzo *Esperanto laŭ naturmetodo* (1963), kiu poste eldoniĝis sub la titolo *Esperanto laŭ metodo Friis*.

El la dana literaturo li tradukis kun W. Jensen la verkon *Taglaboristoj* (1968) de Hans Kirk.

Danan Esperanto-Eldonejon, kiu publikigis multajn internacie popularajn verkojn, Friis gvidis ĝis 1978.

En 1981 la Komitato de UEA elektis lin Honora Membro de la Asocio.

20-26 Turisma Semajno, Sp. Nová Ves, Ĉeĥoslovakio (Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotske nám. 6, CS-058 01 Poprad)

Aŭgusto

15-18 3a Andaluzia Kongreso de Esperanto, Sevilla, Hispanio (Pozo 3, E-41003 Sevilla)

30-01 sept. Pac-Kunveno "Problemoj de paco en amaskomunikiloj", Grodziec kaj Jelenia Góra, Pollando (vidu 03-07 jun.)

Septembro

06-08 1-a Trilanda Renkontiĝo, Palić, Jugoslavio (Vidu 30 jun.)

08-09 Seminario "Balta Maro", Koszalin, Pollando (PEA, vidu 03 jun.)

Oktobro

05-12 Int. Festivalo de Esperantistaj Foto-Kino-Amatoroj, Pisanica, Bulgario (p/a BEA, Bul. Hristo Botev 97, BG-1303 Sofia)

31-03 nov. 21a Kataluna Kongreso de Esperanto/Jubileaj 25aj Internaciaj Floraj Ludoj, S. Cugat del Vallès, Hispanio (vidu 07 jul.)

Novembro

23-24 3a Internacia Kanzon-Teatra Festivalo, Parizo, Francio (UFE, 4 bis, rue de la Cerisaie, F-57004 Paris)

Decembro

06-08 Kultura Semajnfino, Homburg/Saar, FR Germanio (SEL, Schulstr. 30, D-6601 Scheidt)

15-20 Vintro en Ora Prago, Ĉeĥoslovakio (ĈEA, Jilská 10, CS-110 01 Praha 1)

27-04 jan. 86 Ski-Feriado, La Chaux-de-Fonds, Svislando (vidu 24 jun.)

Januaro 1986

03-07 51a Kongreso de Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, Palmerston North (NZEA, P.O. Box 330, Wellington 1)

04-11 25a Aŭstralia Esperanto-Kongreso, Perth (Aŭstralia E-Asocio, P.O. Box 48, Jamison Centre, ACT 2614)

Kongresa Komuniko

70a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Aŭgsburgo (FRGermanio)
3–10 aŭgusto 1985
Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.
Adreso de LKK: Seitzstr. 14, D-8900 Augsburg, FRGermanio.

Programo: La Estraro de UEA en sia aprila kunsido definitivigis la programon de la UK. Novaĵo, kiun ĝi aprobis, estas "Tago de Paco", iniciatita de Japana Esperanto-Instituto, kiu okazos dum la lundo de la Kongreso. Estos aparta kunsido gvidata de vicprezidanto de UEA Umeda Yosimi; speciala broŝuro pri la Tago estos disdonita en la kongresaj dokumentoj; estos ekspozicio kaj speciala librovendado. Jam LKK mem iniciatis specialan teatraĵon, *La Pacludo*, kiu okazos samtage.

En la mardo estos la tradicia Tago de la Lernejo kaj nun, aldone, la merkredo estos Virina Tago. Ni raportis pri la planata virina agado en la aprila Komuniko.

Oni krome planas aparte ampleksan programon por la junularo, kiu povos ĝui apartajn ekskursojn kaj profiti de du salonoj dediĉitaj ekskluzive al neformalaj junularaj agadoj dum la tuta kongreso. Kompreneble tiuj estos aldone al la tradiciaj programeroj prezentotaj de TEJO.

Internacia Kongresa Universitato (IKU): Dek prelegoj konsistigos la 38an sesion de IKU, kies rektoro estas prof. d-ro Helmar Frank (FRG). La elektitaj prelegantoj el inter multaj sinproponoj estas, laŭ la programita sinsekvo: Heiner Eichner (FRG), Rudi Hauger (Svislando), Ye Junjian (Ĉinio), István Szerdahelyi (Hungario), Tibor Sekelj (Jugoslavio), Humphrey Tonkin (Usono), Margrete Landmark (Norvegio), Magomet Isaev (Sovetunio), Amri Wandel (Israelo/Usono) kaj Rudolf Fischer (FRG). La temoj plurfoje spegulas la kongresan temon ("Antikvo kaj moderno: kion ŝanĝi, kion konservi?") en prelegoj pri antikvo kaj moderno en literaturo, pri antikva incenso kaj moderna parfumo, pri la aĝo de la universo mezurita per la plej modernaj metodoj, pri la aktuala furoro en Ĉinio de la rakontoj de pasintjarcenta dana fabelisto kaj pri la modernaj metodoj necesaj por konservi esperantaĵojn en muzeo.

La Kongresa Temo: La ĉi-jara reĝisoro de la kongresa temo estas tiel eminenta, ke necesas nur mencii lian nomon: William Auld. Li prezentos enkondukon al ĝi kaj resumon de ĝi dum la Malfermo kaj Fermo respektive. Inter tiuj du eventoj estos tri laborsesioj, dum kiuj elektitaj parolantoj celos esprimi kelkajn diskutigajn pensojn, post kiuj la publiko estos invitita libere komenti.

Infana Kongreseto: Tri premioj de 100, 50 kaj 25 usonaj dolaroj respektive, atendas la tri infanojn en la ĉi-jara Kongreseto, kiuj plej bone deklamas aŭ kantas.

La reguloj estas simplaj: antaŭ ol veni al Aŭgsburgo, la infanoj bezonas ekzerci deklamaĵon, poemon, kanton aŭ, eventuale, plurajn tiajn artaĵojn. Dum la Kongreseto estos konkurso, por kiu ili povos surloke kandidatiĝi. La tri plej sukcesaj infanoj ricevos la supre menciitajn premiojn, se la juĝisto(j) taksos la nivelon sufiĉe alta.

La malavaraj premioj, por elserĉi talenton kaj pretecon aperi publike sur internacia scenejeto, estas plia donaco de la konata Fondaĵo Grabowski, kiu jam asignis valorajn premiojn al niaj plenkreskaj artistoj.

Ĉi tiu tekso estas unuope sendita al la gepatroj de ĉiuj enskribitaj infanoj. Ankoraŭ eblas peti aliĝilon por la Kongreseto ĉe la konstanta adreso.

Poŝtaj kaj bankaj servoj: LKK bone konscias pri la bezono provizi bonajn poŝtajn kaj bankan servojn dum la Kongreso, sed frontas la problemon, ke la kosto por starigi poŝtan giĉeton en la kongresejo estas altega (la germana poŝtinstanco havas laŭleĝan tarifon kaj devas provizi kvalifikitajn oficistojn). Kongresanoj ricevos tiun servon, sed ne dum ĉiu tago de la Kongreso. La horoj estos publikigitaj. Kompense, estos kongresa poŝta stampo por tiuj, kiuj enpoŝtigas ĉe la kongresa kesto, kaj oni povos aĉeti speciale presitajn Esperanto-poŝtkartojn. Eblos ŝanĝi monon ĉe la bankgiĉeto; ĉiuj aliaj giĉetoj akceptos nur germanajn markojn.

Faka agado: Kvardeko da fakaj kunsidoj estas enskribitaj en la kongresa programo. Krome estos katolika diservo preskaŭ ĉiutage kaj unu ekumena diservo. Pluraj fakaj kunsidoj estos pli ol nuraj jarkunvenoj: temos pri simpozietoj pri, ekzemple, instruado, filozofio, ekologio, kooperativoj k.s. Ĉi tiuj kunsidoj, same kiel preskaŭ ĉiu ero en la kongresa programo, estos malfermaj al la kongresa publiko, kies ĉeesto estas ĉiam tre bonvena.

Kontribuoj al la Universala Kongreso: Ni memorigas kongresanojn kaj aliajn, kiel ili povas diversmaniere kontribui al la ĉi-jara UK: ili povas kandidatiĝi por la kultura manifestacio sur la urba placo aŭ por la Internacia Ĥoro (vidu antaŭajn Komunikojn), ili povas sendi varojn por la Aŭkcio kaj aĉeti varojn ĉe ĝi (vidu *Esperanto*, p. 46, marto 1985), super ĉio, ili povas partopreni multajn eventojn kaj kunsidojn,

ekskursi, bankedi kaj ĝenerale montri esperantistan solidarecon.

Tiuj, kiuj deziras havi pli ol nur pasivan rolon, povas krome proponi sin por pli aktiva engaĝiĝo: specife ni ankoraŭ serĉas profesinivelajn fotistojn kaj magnetofonistojn por subteni la rilatajn kongresajn servojn, kaj mankas instruistoj aŭ simile kompetentaj homoj por gvidi la konversaciajn rondojn por komencantoj. Interesitoj bonvolu anonci sin al la konstanta adreso.

Kongresa Libro: La kongresa libro estas nun en preparo kaj kredeble estos dissendita al kongresanoj en junio. Pro altegaj afrankaj kostoj ni antaŭvidas, kiel pasintece, sendi nur depresaĵon de la programo aerpoŝte al ekstereŭropaj kongresanoj.

Statistiko kaj kotizoj: Ĝis la mezo de majo aliĝis 1 683 kongresanoj el 49 landoj. Tiu dato estis la fino de la dua kotizperiodo. Ekde la 15a de majo la tarifo estas la jena: Kat. 1 (ne individua membro de UEA) 219 gld; Kat. 2 (individua membro de UEA) 188 gld; Kat. 3 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ne estas membro de UEA) 156 gld; Kat. 4 (kunulo/junulo/handikapulo, kiu ja estas membro de UEA) 125 gld.

Recenzoj

Scienca nivelo

Molekuloj (1978), János Nyilasi (1922-1978). El la hungara trad. Lajos Kovács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1984. 118p. Ilus. 20cm. ISBN 963 571 145 X. Prezo: 9,00 gld.

Ne malofte oni aŭdas la plendon, ke en Esperanto mankas scienca literaturo, kaj do ne estas eble, pere de Esperanto, riĉigi sian sciencan scion.

Nu, Scienca Eldona Centro sin ĵetis sur la taskon, plenigi tiun mankon, kaj la traduko de la origine hungara libro *Molekulák* estas bona paŝo al tiu celo.

Pri la enhavo oni povas diri, ke la nivelo estas nepre scienca. La vorto "molekuloj" certe estas konata en vastaj rondoj, sed la plena kompreno de la libro postulas, malgraŭ la populariga stilo, almenaŭ duagradan scion pri fiziko kaj kemio. La libro okupas sin ĉefe pri la strukturo de la molekuloj en rilato kun la proprecoj de la koncernaj substancoj. Oni ricevas klaran bildon pri la "konstruo" de tiuj etaj "partikloj", pri la fortoj inter ili kaj pri la rilato kun ekzemple bolpunkto kaj fandpunkto.

Kiel sur ĉiu scienca tereno, ekzistas konsiderinda nacilingva literaturo, ankaŭ pri la temo molekuloj; ĝi estas tro vasta por resumi en libro de 118paĝoj. La diversaj bazaj aspektoj tamen estas bone reprezentitaj en la libro. Aliflanke estus facile indiki temojn, pri kiuj oni dezirus havi pli da detaloj.

La traduko estas preskaŭ senmanka, nur ie kaj tie la recenzanto elektus alian terminon, sed pri tio oni povus diskuti. Ekzemple la recenzanto ĝis nun ne sentis la nepran bezonon de la finaĵo *-enzo* anstataŭ *-ilo* en vortoj kiaj *solvenzo/solvilo* (por la likvaĵo). Pri kelkaj aliaj la recenzanto serĉos kontakton kun la tradukinto. Tiuj rimarkoj tamen estas negravaj kompare kun la bona tutaĵo.

Molekuloj estas bona libro, kiu tamen postulas sufiĉe vastan bazan scion.

Wessel J. Nijveld (Nederlando)

Utila turisma helpilo

40 vidindaj lokoj en Ĉinio. El la angla trad. Censinio (pseŭd.). Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 251+19p. Kolorilus. Mapo. 19cm. Feniksa Libraro. 12-Es-1825P. Prezo: 9,00 gld.

Partopreni la 71an Universalan Kongreson en Pekino en 1986 kaj vidi nur Pekinon verŝajne nemultajn kontentigus. Sed kien turni sin en tia granda nekonata lando? Por fari la programon multe povas helpi la libro *40 vidindaj lokoj en Ĉinio*. Ĝi alproksimigas al la leganto 40 el la sennombraj vidindaĵoj de tiu admirinda lando: belegajn lokojn en la naturo, antikvajn kaj pli novajn kulturajn monumentojn, muzeojn, templojn, arkitekturaĵojn, arkeologiaĵojn kaj helpas elekti el inter ili. Kaj kiu pro io tamen ne povos decidiĝi, tiu eble vizitos almenaŭ la mondfaman Grandan Muron, la imponan, ses mil kilometrojn longan konstruaĵegon, kiu estas videbla eĉ de sur la Luno.

Al ĉiu el la 40 vidindaĵoj estas dediĉita aparta artikolo kun la bezonaj geografiaj, historiaj, kulturaj, teknikaj kaj aliaj informoj, iuj eĉ kun plumdesegnaĵo. Krom tio, pri 20 el la vidindaĵoj estas allogaj koloraj fotoj, kiuj perfekte pravigas la ĉinan proverbon: "Unu bildo valoras mil vortojn". Sed la libro ne estas nura turisma varbilo. En la artikoloj, pliriĉigitaj





per notoj por faciligi la komprenon, oni legas krom la priskribo de la loko ankaŭ interesajn legendojn kaj popolrakontojn pri tiuj lokoj, kaj do post la tralego de la libro oni havas ankaŭ iom da scioj pri la historio de Ĉinio. Ĉe la fino de la libro, troviĝas kronologia tabelo de la historio kaj utilega indekso de lokaj kaj personaj nomoj, eĉ kun indiko de ilia elparolo.

La lingvaĵo de la libro estas klara, afereca, simpla, kia estas konvena por priskribi tiel diversfacetan temaron – eĉ se ni tamen povas riproĉi al ĝi iujn neprecizaĵojn, ekz. en la frazo "Turninte al la internaj flankoj... oni povas vidi..." la verbo turni devas esti refleksiva, do: "Turninte *sin* al la internaj...". Bonŝance, eraroj ne estas multaj, kaj la teksto, salutinde, estas plejparte verkita en mallongaj, simplaj frazoj. Preseraroj praktike ne troveblas.

Ĉi tiu libro estas tre utila helpilo por ĉiuj partoprenontoj de la 71a Universala Kongreso – eĉ por tiuj, kiuj vizitos neniun el la proponitaj vidindaĵoj, ĉar traleginte la libron, ili ekscios multon ĝenerale sciindan kaj sendube travivos la kongreson pli profunde, kun pli granda sentemo por la loko kaj ĝia atmosfero ol tiuj, al kiuj mankos tiuj ĉi informoj.

Eduard V. Tvarožek (Ĉeĥoslovakio)

Unuaklasaj tradukoj de la franca poezio

La mezepoka periodo. El la franca trad. Gaston Waringhien (1901). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1984. 183p. 20cm. Beletra Eldonserio, n-ro 18; Plejado 1. Dulingva: Esperanta-franca. Prezo: 27,90 gld.

Kvankam kronologie reprezentante la komencon, ĉi tiu volumo aperas kiel la lasta en la serio, en kiun cetere ne enprogramiĝis la ĉi-jarcentaj skoloj, ekde la modernismo.

Du trafajn decidojn faris la kompilinto rilate la elekton. Unue li rezignis enpreni eltiraĵojn el la multaj longaj poemoj de la periodo. Escepto estas "La granda testamento", kies nekompleteco tamen ne malhelpas ĝin bone kompreni, ĉar la diversaj legacoj estas sendependaj inter si, tiel ke oni eĉ ne rimarkas la ellason de pluraj el ili. Per la dua decido li kondukas nin tra la parko de la franca poezio, haltante ne antaŭ ĉiu arbo, arbusto kaj arbedo, sed nur antaŭ la kvar plej belaj kaj bonodoraj florplantoj. Ni promenantoj ne povas ne danki al nia ĉiĉerono lian saĝan elekton. Kvazaŭ aperitive li al ni servas unue kelkajn popolkantojn el la 12a jarcento, "kies freŝa naiveco estas ankoraŭ ĝuebla".

Same kiel la ceteraj volumoj, ĉi tiu enhavas erudician enkondukon, la originalajn tekstojn paralele kun la tradukoj, pri ĉiu el la kvar poetoj biografiajn notojn kaj valorajn komentojn pri ilia verkaro, kiuj certe helpos la leganton penetri en la mondrigardon de la okcidenteŭropa mezepoka homo. Komprenante lian idearon, ni ne plu povos konsideri lin fremdulo, ĉar cetere ja klara kaj rekta estas lia parolo, eĉ kiam li uzas simbolan lingvon, la alegorian kaj personigan tiuepokan teknikon, jam sufiĉe konatan el la moralecludoj. Ankaŭ tre utilas la biografiaj notoj, per kiuj eventualaj interesatoj sciiĝos, kie trovi pliajn tradukojn de tiu aŭ alia aŭtoro.

Kelkfoje ni, sur kiujn pezas ankoraŭ la hipokrita prudeco de la ĵus pasintaj jarcentoj, estas tentataj nomi kruda ilian pritrakton de kelkaj aferoj, inter ili de la seksaj, absolute normala temo en ilia epoko. Tiel ni konatiĝas kun la satiristo Rutebeuf, funde kontraŭmonakisma, kvankam sincere religia. Ni lernas pri Charles, duko de Orleano, lasta el la francaj kortezaj poetoj, forkaptita en Anglujo dum 25 jaroj. Tiel li enprofundiĝis en la anglan kaj en ĝi verkis tiel perfekte, ke li enrangiĝas inter la plej elstaraj mezepokaj poetoj de tiu lando. Tion rekonas *Encyclopaedia Britannica* (la plej renoma anglalingva enciklopedio), samtempe taksante liajn anglajn versaĵojn superaj al la francaj, en tio ke ili formas pli koheran unuon kaj estas pli naturaj kaj viglaj, ol liaj zorge poluritaj kaj retenitaj francaj versoj. Dum Charles estis samtempe grandnobelo kaj poeto, Villon rolas samtempe kiel ŝtelisto-vagabondo kaj grandpoeto, forta spirito en malforta karno. Nur ĉar aperante flanke de tiuj

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:

"La gazeto ne nur estas en si mem interesa, stimula kaj pedagogie valora; mi trovis ĝin la plej bona propagandilo, kiun mi havas. Tuj kiam homoj vidas, ke ekzistas serioza, inteligenta kaj dece prezentita gazeto pri aktualaj aferoj kaj kulturaj fenomenoj, tio ege altigas la prestiĝon de Esperanto."

Marjorie Boulton pri MONATO

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: **MONATO,** Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).

unuagrandecaj steloj, iom pli pale brilas la alia korteza poeto, Marot.

Evidente ankaŭ la tradukoj estas unuaklasaj, tion garantias la nomo Waringhien. Bedaŭrinde la strikta forma fideleco, ĉefe la kvar-, kelkfoje sesoblaj rimoj, ne ĉiam fluas tute nature, malgraŭ la virtuozeco de la tradukinto. Male, kiam la rimoj donas la ŝancon, kiel en la rondaŭo sur paĝo 101, la traduko estas perfekta. Ankaŭ sur paĝo 127: "Ĉar de l' malfasto venas festo", por redoni *Car de la pance vient la dance* frapas kiel unu el tiuj feliĉaj inspiroj de poeto-tradukanto.

La prezento estas zorga, kiel cetere ĉiuj Gabrielli-eldonaĵoj. Mi rimarkis tamen en la piednoto sur paĝo 60, ke anstataŭ "franca" probable devus stari *franka*, kaj sur paĝo 37, 5a linio, anstataŭ "konfidojn", *konfidencoj*. Se ne preseraro, tiam dormetis bona Homero.

Por tiu, kiu interesiĝas pri beletro, nenio estas pli rekomendinda ol la kompleta serio, ĉar la franca poezio rolas ja kiel unu el la ĉefkolonoj de la eŭropa literaturo.

Leopoldo H. Knoedt (Brazilo)

Laste aperis...

Antaŭuloj, La. Maurice Shadbolt. El la angla trad. Grace Davis. Velintono: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, 1984. 19p. Mimeo. 21cm. Serio Sudaj Floroj, n-ro 4. Novzelanda vivrakonta novelo. Prezo: 4,80 gld.

Biblia vortaro, komp. H. Paruzel, E. Wojtakowski k.a. Romo: Internacia Asocio de Bibliistoj kaj Orientalistoj, 1984. 415+17p. Ilus. 22cm. Bind. Enciklopedieca konsultlibro kun ĉirkaŭ 4 000 serĉvortoj, kun diversaj tabeloj. Prezo: 69,00 gld.

Du rakontoj el *Mia nomo estas Aram* (1940), William Saroyan (1905-1981). El la angla trad. Ŝiger Ujeki. Tokio: Eldonejo Iogi, 1984. 39p. 18cm. Du noveloj, "La somero de la bela blanka ĉevalo" kaj "Lokomotivo 38, la 'Ojibway'-ano" de usona verkisto, kun postparolo de la tradukinto. Prezo: 8,10 guldenoj.

Esperanta legolibro (1925), Elio Migliorini (1902). Romo (ne indikita): Itala Instituto de Esperanto, 1985 (6a eld.). 256p. 17cm. Populara, pli ol cent-era legolibro, dividita en partojn pri la vivo, lingvo kaj literaturo. Prezo: 15,90 gld.

Espéranto et le mouvement espérantiste à Lyon des origines à 1950, L', André Vedrine. Liono: Centre Espéranto de la Région de Lyon, 1983. 99p. Mimeo. 21cm. Historio pri la Esperanto-movado de Liono, Francio, kun nomindekso. Prezo: 25,20 gld.

Esperanto-kurso, Karmenu Mallia (1929). Valeto (ne indikita): Esperanto-Societo (Malta), 1985. 39p. 28cm. Elementa porkursa lernolibro 12-leciona por maltlingvanoj laŭ "la zagreba instrumetodo", kun tabeloj kaj dudirekta vortareto. Prezo: 11,40 gld.

Esperanto-lernolibro/Učebnik esperanta, komp. Spomenka Štimec, Zlatko Tišljar k.a. En la slovenan trad. Sonja Tavčar. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1981. 37p. 20cm. Elementa lernolibro por slovenlingvanoj, kiu utiligas la 350 plej oftajn vortradikojn laŭ la "zagreba instrumetodo"; dulingva vortareto kaj prezento de la gramatiko. Prezo: 2,40 gld.

Espéranto vivant, L'; Cours pratique complet (1964), Pierre Delaire. Orleano: Centre National Espéranto-Office, 1985 (represo de 2a eld. de 1976). 128p. Ilus. 21cm. Kompleta 12-leciona kurso, kun tekstoj, ekzercoj, gramatikaĵoj kaj vortlistoj. Prezo: 32,40 gld.

Fidindeco, red. Péter Broczkó kaj Ilona Koutny. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio/Scienca Eldona Centro de UEA, 1985. 64p. Ilus. 24cm. N-ro 5 de *Internacia komputado*. ISBN 963 571 149 2. Dek ok artikoloj ĉefe pri krimoj kaj sekureco en la mondo de la komputado. Prezo: 7,50 gld.

Geiriadur Esperanto/kimra vortaro, J.C. Wells (1940). Londono: Grupo Kvin – Esperanto en Radio kaj Televido, 1985. 127p. 15cm. Dudirekta vortaro kun po ĉirkaŭ 3 000 serĉvortoj, plus kimralingva prezento de Esperanto kaj 12-paĝa prezento de la kimra lingvo en Esperanto. Prezo: 12,90 gld.

Ĝemelaj steloj kaj aliaj, La, Miayazawa Kenzi (1896-1933). El la japana trad. Konisi Gaku, Nezu Izumi k.a. Tokio: Japana Esperanto-Instituto, 1984. 62p. 21cm. Unu poemo kaj kvar fabeloj pri la homoj kaj kamparo, kun biografio kaj glosaro. Prezo: 13,80 gld.

Kantoj de l' silento, Zora Heide (1924). El la kroata trad. L. Borčić, I. Borovečki, E. Lapenna. Stokholmo: Författares Bokmaskin, 1984. 135p. Ilus. de D. Toplak. 21cm. Dulingva: Esperanta-kroata. ISBN 91 7328 449 1. Poemaro de produktiva esperantista aŭtorino. Prezo: 12,30 gld.

... kun siaspeca spico! (1971) Raymond Schwartz (1894-1973). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1985 (2a eld.). 215p. 21cm. Jubilea Eldonserio: 1 Beletro originala 7. Antologio el la humuraĵoj de Schwartz, represitaj ĉefe el diversaj revuoj; i.a. enestas la tuta serio de *Laŭ mia... ridpunkto*. Prezo: 33,60 gld.

Leksikono de aktivaj jugoslaviaj esperantistoj, Marinko Gjivoje (1919-1982). Borovo: "Voĉo", 1985. 311p. Ilus. 20cm. Biografiaj notoj pri pli ol 800 esperantistoj. Prezo: 33,00 gld.

Lupo invitas urson, Mej Jing. Pekino: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1984. 37p. Kolorilus. de la aŭtoro. 18cm. 88-Es-189P. Porinfana fabelo pri trompo, kun grandaj plenkoloraj bildoj. Prezo: 3,00 gld.

Mezepoka periodo, La. El la franca trad. Gaston Waringhien (1901). Ascoli Piceno: Eldono Gabrielli, 1984. 183p. 20cm. Beletra Eldonserio, n-ro 18, Plejado 1. Dulingva: Esperanta-franca. Kolekto de francaj poemoj el la mezepoko (de la 12a ĝis la 15a jarcento), i.a. de Rutebeuf, Charles d'Orléans (1394-1463), François Villon (1431-1464?) kaj Clément Marot (1497-1544); kun glosaro, enkonduko kaj notoj de la tradukinto. Prezo: 27,90 gld.

Molekuloj (1978), János Nyilasi (1922-1978). El la hungara trad. Lajos Kovács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro, 1984. 118p. Ilus. 20cm. ISBN 963 571 145 X. Populara prezento de la bazaj nocioj pri atomoj kaj molekuloj, el la vidpunktoj de la ĝenerala, organika, neorganika, fizika, polimera kaj biologia kemioj, kun glosaro. Prezo: 9,00 gld.

Mondo ne havas atendejon, La (1950), Maurits Dekker (1896-1962). El la nederlanda (1951) trad. Frits Faulhaber (1893-1979). Parizo: Sennacieca Asocio Tutmonda, 1985 (2a eld.). 80p. 20cm. SAT-Broŝurservo. Tre sukcesa tri-akta teatraĵo pri la konsekvencoj de la atombombo. Prezo: 6,90 gld.

Obstine antaŭen; Prilozi za povijest esperantskog pokreta u Osijeku, Antun Šimunić. Osijek: Liberiga Stelo, 1983. 51p. Ilus. Mimeo. 20cm. Nacilingva historio pri la Esperanto-societo Liberiga Stelo en Osijek, Jugoslavio, kun Esperanta resumo. Prezo: 6,00 gld.

Parolu Esperanton; Método autodidacta de Lengua Internacional Esperanto, José F. Arroyo. Madrido: Tiempo de Ediciones S.A., 1984. 47p. Ilus. de Carlos F. Arroyo. 30cm. ISBN 84 7582 008 5. Elementa 15-leciona lernolibro por hispanlingvaj gejunuloj en la formo de profesie desegnita bildstria rakonto kun gramatikaj klarigoj por memlernado; Esperanta-hispana vortareto. Prezo: 13,20 gld.

Pasporta servo; Listo de gastigantoj, TEJO, 1985/86. Hamburgo: Pasporta Servo/DEJ, 1985. 64p. Mapoj. Mimeo. 21cm. La 12a listo de gastigantoj, kun pli ol 600 adresoj el 53 landoj. Prezo: 5,70 gld.

Pordoj, Stefan MacGill (1948). Rotterdam (neindikita): la aŭtoro "stefeto", 1985. 84p. Ilus. de Katie Keates. 21cm. La tria skeĉlibro de la aŭtoro, enhavanta 11 lingve simplajn kaj gradigitajn skeĉojn, kun demandoj, notoj por kursgvidantoj kaj vortlisto. Prezo: 8,10 gld.



Sciencaj komunikaĵoj 1985; Tekniko, red. A. Lukács. Budapeŝto: Scienca Eldona Centro de UEA, 1985. 96p. Ilus. 24cm. Dek artikoloj pri aspektoj de inercirado, sciencaj nocioj, vakutekniko, metalforteco, ŝutaĵ-transporto, sismiko, metaltranĉado, leviloj kaj kondukmaterialo, kun fakaj anoncoj. Prezo: 9,00 gld.

Sep vangofrapoj (1936), Károly Aszlányi (1908-1938). El la hungara (1943) trad. László Somlai (1906-1971). Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1984 (2a eld.). 148+13p. 20cm. ISBN 963 571 131 X. Amuza romano de populara verkisto, siatempe filmigita. Prezo: 15,00 gld.

Strategiaj demandoj de la Esperanto-komunumo. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1985. 145p. 22cm. ISBN 83 7013 012 7. Kolekto de 13 prelegoj (de Aleksiev, Behr, Duc Goninaz, Knöschke, Leyk, Marević, Ragnarsson, Ratkai, Révész, Silfer, Symoens, Tišljar, Żelazny) el la 1-a Internacia Seminario en Varsovio (aprilo 1984), kun antaŭparolo de Jerzy Leyk. Prezo: 15,00 gld.

Sugestoj por kompletigo de la jura/diplomatia terminaro, Ladislao Dubravszky. Eldonloko ne indikita: Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj, 1984. 27p. 23cm. Proponoj pri radikoj ne en *Plena ilustrita vortaro* kaj pri vastigo en la signifo de aliaj, kun ekvivalentoj en la franca, angla kaj germana kaj difinoj en Esperanto; antaŭparolo de Ivo Lapenna. Prezo: 9,60 gld.

Ŝtona gasto, La, Michel Duc Goninaz (1933). Aix-en-Provence: "H. Elik", 1984. 19p. Mimeo. 30cm. Kvar-scena "miniatura tragedio" por kvar roluloj pri la mito de Donjuano. Prezo: 4,50 gld.

Tena, Josip Kozarac (1858-1906). El la kroata trad. Josip Pleadin. Zagrebo: Internacia Kultura Servo, 1984. 45p. 20cm. Vivrakonta novelo pri virino. Prezo: 6,00 gld.

Učebnik jazyka esperanto, V.Z. Semenova kaj M.I. Isajev. Moskvo: Nauka, 1984. 264p. Ilus. 22cm. Dudekkvin-leciona lernolibro por ruslingvanoj laŭ gramatika metodo por klasoj kun instruanto, kun aparta prezento de la gramatiko, ampleksaj legekzercoj, dudirekta vortareto kaj listo de malongigoj. Prezo: 21,00 gld.

Varmega kamparo (1929), Zsigmond Móricz (1879-1942). El la hungara trad. István Nagy. Budapeŝto: Hungara Esperanto-Asocio, 1985. 169p. 20cm. ISBN 963 571 049 6. Romano de konata verkisto pri la socia stato de la hungara meznobelaro komence de la nuna jarcento; lingve reviziita de William Auld, kun postparolo de Georgi Mihalkov. Prezo: 18,00 gld.

Vespero jam fariĝis; Agregaĵoj kaj robajoj, Rikardo Ŝulco (Richard Schulz, 1906). Paderborn: Esperanto-Centro, 1985. 66p. (nenumeritaj). Ilus. de la aŭtoro. 21cm. ISBN 3 922570 39 9. Cent okdek alfabete ordigitaj meditaĵoj en verskvaroj kun 60 desegnaĵoj. Prezo: 21,00 gld.

Viro en nigra mantelo kaj aliaj rakontoj, Barbara Sokalówna. Varsovio: Pola Esperanto-Asocio, 1984. 96p. 20cm. ISBN 83 7013 007 0. Ok originalaj noveloj, kun postparolo de la aŭtorino. Prezo: 9,00 gld.

Vjetnamio-Sovetio, longdistancaj sed proksimaj. Hanojo: Fremdlingva Eldonejo, 1982. 151p. 19cm. Pri la historio kaj nunaj rilatoj inter la du landoj. Prezo: 6,00 gld.

Diversaĵoj:

Veselin Damjanov koncertas en Kanado. Sidney (Kanado): Emistudio Esperanto Publications, 1985 (ne indikita). Kaseto, kun tekstofolio. Arioj, popolkantoj kaj kanzonoj en Esperanto, la franca, itala, rusa, angla kaj bulgara de la konata baritona solisto de Ŝtata Muzika Teatro de Sofio. Prezo: 31,80 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 5%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 19% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!

Kontribuojn sendu al la ĝenerala sekretario de TEJO: N. Saletti, Via Libia 20/4-1, I-40138 Bologna.

Unispace, IJJ kaj Esperanto

Jen kaj jen aperas informoj pri projekto nomata Unispace, kiu internacie aplikos kaj instruos Esperanton. Pri kio temaŝ? Unispace estas projekto, kiun proponis por la Internacia Junulara Jaro (IJJ) la Komisiono de Neregistaraj Organizoj ĉe Unuiĝintaj Nacioj (en kiu membras ankaŭ UEA). La iniciatintoj estas d-ro Marshall Whithed de Asocio por la Monda Universitato kaj s-ino Dorothy Nicklus de Internacia Federacio de Profesiaj Virinoj.

La projekto, kies plena anglalingva nomo estas *Young Unispace – Simulated World 2001* (Juna Unispaco – simulita mondo de 2001), estas mikrokomputila sistemo, kiu celas instrui al gejunuloj internacie (sed precipe el evolulandoj) temojn kiel ekonomion, internaciajn rilatojn, komputosciencon kaj teknologiajn fakojn. Por la instruado oni utiligos la metodon de simulado-ludo, en kiu la partprenantoj devos plenumi rolojn de diversaj funkciuloj, kiel ŝtatestroj, ministroj, ekonomiistoj, inĝenieroj kaj simile, kio stimulos ilin akiri la instruendan materialon. La ĉefstabejo de la projekto estos en Vieno, kie oni edukos la gvidontojn por la lokaj branĉoj, organizos la internaciajn programojn kaj gvidos la simuladon. Lokaj centroj estas planataj en Tajlando, Hinda Unio, Kenjo, Gano, Brazilo, Kuvajto, Aŭstrio kaj Usono (Novjorko).

Ni konceptis duoblan rolon por Esperanto: kiel komuniko-lingvo kaj en simulado de internaciaj rilatoj. Por klarigi tion, necesas pli detale priskribi kiel funkcios la simulado-ludo. Ĉiu partoprenanto, sidanta antaŭ komputila terminalo, povos instrukcii al la programo kiĕl dividi siajn rimedojn inter la diversaj aktivadoj sub lia aŭ ŝia respondeco. Tiuj instrukcioj estos en numera formo. Por sukcese plenumi tiun taskon, la partoprenantoj devos akiri kaj apliki ĝeneralan scion kaj specifajn labormetodojn en la instruataj fakoj. La instrua parto konsistos el memstaraj, meminstruaj kaj laŭplaĉe utiligeblaj komputilaj lernmoduloj, kiuj estos uzeblaj en la lokaj centroj. Por kapabli progresi en la simulado, la ludantoj devos apliki la lernmodulojn. Aldone, ili povos komuniki kun aliaj ludantoj, por interŝanĝi informojn, kunlabori, fari kontraktojn kaj eĉ por simple babili. Tiu komunikado estos en la formo de libera teksto. La instrukcioj kaj komunika teksto estos senditaj inter la centro de Vieno kaj la branĉoj pere de satelita komunikado.

La simulado havas do tri lingvajn aspektojn: 1) la instrukcioj sur la ekrano, 2) la lernmoduloj kaj 3) la komunikado inter la partoprenantoj. Komence, 1 kaj 2 estos en la angla. Tamen estos relative facile traduki la tekstoliniojn en alian lingvon. Aliflanke, por komuniki kun aliaj, la partoprenantoj devos uzi Esperanton. La simulado prezentos Esperanton kiel la estontan internacian komunikilon kaj proponos al la partoprenantoj uzi la lernmodulon de Esperanto, kiu estos havebla kun ĉiuj aliaj lernmoduloj. Ĉar komunikado kun aliaj ludantoj donos evidentajn avantaĝojn, ekzistos forta motivo por akiri scion pri Esperanto. Tio havas la aldonan pedagogian celon simuli dediĉon de rimedoj por internacia komunikado flanke de ŝtatoj, entreprenoj kaj internaciaj organizoj. Kandidato por praversio de la Esperanto-lernmodulo estas la ekzerco-programo "E1", verkita de Jim Deer el Usono. Tiu modulo estos registrita sur mikrokomputila disketo, sendependa de la simulado-programo kaj sekve facile akirebla kaj uzebla de unuopuloj kaj edukaj institucioj, kiuj posedas mikrokomputilon.

En marto 1984 Unispace estis unu el la 13 organizoj invititaj al la internacia renkontiĝo "Apliko de Informtekniko por Evoluigo", organizita de *Unido* (UN-Organizo por Industria Evoluigo) en Vieno. Unido decidis adopti Unispace kiel oficialan projekton por la IJJ. En la sama okazo oni montris vidbendon pri la projekto. Tiun bendon oni esperas montri ankaŭ en la UK en Aŭgsburgo.

La trejnado de ĉirkaŭ 20 gvidontoj komenciĝos en la venontaj monatoj. La kandidatoj, kiuj post la trejnado revenos al siaj landoj por funkciigi la lokajn branĉojn, estos nomitaj de komisiono, en kiu estos reprezentantoj de neregistaraj organizoj kaj UN-funkciuloj pri la IJJ. Tiu komisiono elektos ankaŭ la partoprenontojn, kiujn proponos iliaj landaj instancoj. Oni antaŭvidas 10-15 trejnitojn en ĉiu loka branĉo.

La kompanio Digital/IVAS promesis mikrokomputilon kaj vidodiskojn. Lastatempe Intelsat de Novjorko promesis la necesan satelitan komunikadotempon. La monvaloro de la promesitaj kontribuoj jam superas milionon da usonaj dolaroj.

Komence de 1984 UEA skribis al la iniciatantoj de Unispace, esprimante sian pretecon kunlabori. De tiam la rolo de Esperanto en la projekto tiel konkretiĝis, ke en lastatempa dokumento tiu rolo estas klare prezentita, kaj UEA estas menciita kiel unu el la ĉefaj subtenantaj organizoj.

La unua fazo de Unispace ekfunkcios en la Internacia Junulara Jaro 1985. En marto oni finis la demonstradan programon kaj nun antaŭvidas pretigi la simulado-programon meze de la jaro.

Amri Wandel

Eŭropo

● **Belgio:** De sia fondiĝo en 1979 la loka grupo en Leuven, Esperanto 2000 (organizinto de la 38a Internacia Junulara Kongreso en 1982), ĉiujare okazigas kursojn. Kvankam tio estas la devo de ĉiu grupo kun kompetenta instruisto, la kursoj en Leuven okazas kiel parto de la oficiala socia programo "Instruado por Socia Promocio", laŭ kiu lernantoj rajtas subtrahi studhorojn de siaj laborhoroj. Informojn donas d-ro P. Kempeneers, Grote Markt 3, B-3300 Tienen, Belgio.

● **Ĉeĥoslovakio:** La Fervojista Sekcio de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, kunlabore kun la vojaĝagentejo Čedok, anoncis internacian renkontiĝon "Vintro en Ora Prago", kiu okazos de la 15a ĝis la 20a de decembro. Pliajn informojn sendas Čedok, Kongresa Sekcio, Na příkopě 18, CS-111 35 Praha 1, Ĉeĥoslovakio.

● **FR Germanio:** Ĵus aperis tre bela plenkolora turisma prospekto 24-paĝa en Esperanto pri la urbo Aalen, inter Stuttgart kaj Aŭgsburgo, en FR Germanio. Ĝi haveblas de Städtisches Verkehrsamt, Rathaus Aalen, Postfach 1740, D-7080 Aalen/Württemberg, FR Germanio.

● **Greklando:** La 28an de marto la ĝenerala sekretario de Unesko, s-ro Amadou Mahtar M'Bow, vizitis Atenon. Okaze de la restado Helena Esperanto-Ásocio bonvenigis lin per teleksa mesaĝo.

● **Irano:** Aperis jam la dua numero de la Esperanto-bulteno *Ŝiraza espero*, eldonata de Omida Kultura Asocio. Tiu numero, la maja, estas 16-paĝa kaj plejparte en Esperanto. Bone mimeografita, ĝi aspektas kiel tre multaj eŭropaj Esperanto-bultenoj.

● **Sovetunio:** En la germana (kaj supozeble ankaŭ alilingvaj) eldonoj de la unua ĉi-jara numero de la revuo *Sowjetisches Usbekistan* (Soveta Uzbekistano) aperis unu-kolumna skizo pri la historio kaj nuna stato de la Esperanto-movado en tiu respubliko. Oni skribis i.a., ke nur al la laborrondo sub Uzbeka Societo por Amikeco kaj Kulturligoj kun Eksterlando apartenas 300 homoj.

● **Irlando:** La 23an de majo, en la malfrua "epiloga" programo de la irlanda ŝtata televido (Radio Telefís Éireann), Girvan Mackay mallonge parolis pri la vivo kaj laboro de d-ro L.L. Zamenhof.

● **Korea Respubliko:** Ekde la nuna semestro Esperanto estas oficiala dua fremda lingvo en Universitato Danguk, Seulo. Instruas docento Bak Giwan, ĝenerala sekretario de Korea Esperanto-Asocio, du horojn semajne al ĉirkaŭ 130 studentoj.

● **Venezuelo:** La 15an de marto oni fondis en Marakajbo Zulian Esperanto-Ligon (ZEL), kiu celas disvastigi Esperanton en la okcidenta parto de Venezuelo, kunlabore kun Venezuela Esperanto-Asocio, al kiu ZEL jam aliĝis. Jam okazis du lingvokursoj kun sume 30 gelernantoj. Meze de aprilo gastis en Marakajbo s-ino Neli Caneva Abaĵieva el Bulgario, kies prelegoj multe entuziasmigis lokajn esperantistojn. ZEL starigas bibliotekon kaj volonte akceptas donacojn de libroj, gazetoj ks. La adreso: S-ro José H. Nieto, Apartado 15250, Edo. Zulia, Maracaibo, Venezuelo.

Foto: Armand Verkimpe

● **Francio: Partoprenis la Internacian Esperanto-Semajnon en Nico, suda Francio, de la 30a de marto ĝis la 6a de aprilo, 120 aliĝintoj el naŭ landoj. Okazis kvar Esperanto-kursoj, inkluzive de kurso por komencantoj, kiuj venis pro la aperigo de ses longaj artikoloj en la loka jurnalo. Aperis favoraj artikoloj ankaŭ dum kaj post la aranĝo, kiu ĝuis la honoran prezidantecon de la deputito-urbestro de Nico. Okaze de la Semajno la turisma oficejo de la urbo eldonis koloran prospekton en Esperanto.**

Azio

● **Aŭtomata tradukado:** La 29an de marto aperis en la japana ĵurnalo *Yomiuri sinbun* (ok milionoj da ekzempleroj) tutpaĝa reklamo de la japana elektrokompanio Nippon Denki Kabusikigaisya (alinome NEC) rilate ĝian projekton de aŭtomata traduksistemo, demonstratan dum Universala Ekspozicio de Scienco en Tukuba, kiu daŭras de marto ĝis septembro ĉi-jare. Ne tiel surprize, se la anonco ne estus kvazaŭ reklamo por Esperanto! Helpe de Japana Esperanto-Instituto, aperis bela portreto de Zamenhof sub la slogano "Ni deziras interkomunikiĝi ĉiam, ĉie, kun ĉiuj" en Esperanto kaj la japana. Aperis pluraj informoj pri la historio de Esperanto, kvankam la vortoj "... ni de NEC provas realigi tiun revon per nova teknologio..." montras, ke certaj teknologoj ne komprenas la plenan realon de la monda lingvo-problemo. La reklamo aperis ankaŭ la 30an de marto en alia ĵurnalo, *Nihon keizai sinbun* (Japana ekonomia ĵurnalo; du milionoj da ekzempleroj). La reklamoj kostis kune 27 milionojn da enoj, kio estas ĉ. 380 mil guldenoj.

● **Bibliotekoj:** Aperis suplemento al *Katalogo de Esperanto-periodaĵoj* ĉe la Urba Publika Biblioteko de Kortrijk, Belgio. La unua eldono aperis en 1982. Ĝi kovris la jarojn 1970-81, dum la 15-paĝa suplemento kovras la akiraĵojn de 1982-84. La tuta kolekto de Esperanto-periodaĵoj konsistas el 1 744 titoloj.

● **Disertacioj:** La 14an de marto s-ino Marie-Thérèse Lloancy defendis ĉe Universitato René Descartes, Parizo, sian doktoriĝan disertacion en la sekcio pri la ĝenerala kaj aplika lingvistiko *Espéranto et jeu de mots dans l'œuvre de Raymond Schwartz (1894-1973)* (Esperanto kaj vortludado en la verkaro de Raymond Schwartz). La disertacio ricevis la

noton "tre honorinda". Mirige estas, ke ĝi havas 1 176 paĝojn kaj pezas 6,3 kilojn! Pro tio ne eblas ĝenerale distribui ĝin, kvankam la aŭtorino serĉas eldononton.

● **Federismo:** La 29an de junio la Eŭropa Federista Movado organizos manifestacion en Milano, Italio, okaze de tiea kunveno de la ĉefministroj de la ŝtatoj-membroj de Eŭropa Ekonomia Komunumo. La temo de la manifestacio estos "Eŭropa Unio, tuj!". Informoj pri aparta esperantista partopreno riceveblas de d-ro Umberto Broccatelli, Via G. Brodolini 10, I-00139 Roma, Italio; ☎ 06/818 46 52.

● **Komputado:** Antaŭ nelonge aperis la unua numero de nova faka revuo en Esperanto: *Aktuala komputiko*, redaktita de Christian Bertin. Al tiu novaĵo oni eble reagas per la demando, "Ĉu ne jam ekzistas la revuo *Internacia komputado*?". Jes, sed *Aktuala komputiko* havas la subtitolon "nur por komputistoj", ĉar ĝi estas sole por teknikaj artikoloj originale verkitaj en la Internacia

● **Srilanko: Stefan Keller (maldekstre, kaŭranta, kun barbo) de Kultura Centro Esperantisto, Svislando, pasigis kelkajn monatojn en Srilanko por diversloke instrui kaj informi pri Esperanto. Ĵurnalaj raportoj pri lia agado donis rikolton de pli ol 200 informpetoj. La foton oni faris okaze de la pasintjara Zamenhof-Tago en Kolombo. Tie funkcias Esperanto-oficejo por informado kaj renkontiĝoj: Esperanto-Centro Srilanka, 71 Pagoda Para, Nugegoda (Colombo): ☎ 55 21 85. Eksterlandaj vizitantoj estas aparte bonvenaj kaj povas tie tranokti.**

Lingvo. La unua numero havas 54 paĝojn, kun la artikoloj "La prelegservilo Tisane" (Ch. Bertin), "La programigo de stor-kopioj" (B. Gärtner), "Iuj rimarkoj pri la algoritma lingvo Algol 60" (B. Gärtner) kaj "Defenda kaj dinamika analizo" (M. Vanden Bempt). Pliaj informoj estas haveblaj de s-ro M. Ch. Bertin, Rue de Clos Courtel, BP 59, F-35510 Cesson-Sevigne, Francio.

● **Kooperativismo:** La 3a Kooperativa Esperanto-Konferenco okazos en Plovdiv, Bulgario, de la 27a ĝis la 30a de septembro ĉi-jare. La ĉeftemo estos "Junularo en la kooperativoj". Pliaj informoj estas riceveblaj de Centra Kooperativa Unuiĝo, Esperanto-Sekcio, ul. G. Rakovski 99, B-1000 Sofia, Bulgario.

● **Lingvo:** Laŭ oficiala informo de Akademio de Esperanto, ĝi elektis Baldur Ragnarsson direktoro de la Literatura Sekcio kaj Bernard Golden direktoro de la Sekcio pri la Ĝenerala Vortaro.

● **Medicino:** La 5a Internacia Medicina Esperanto-Konferenco okazos de la 8a ĝis la 14a de septembro en Schwerin, Germana DR, sub la temo "Kun sana junularo por popola bonfarto kaj paco". Oni traktos i.a. ankaŭ problemojn de la medicina terminologio en Esperanto. Prelegantoj estas ankoraŭ petataj sin anonci. Pliajn informojn sendas Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, Charlottenstr. 60, DDR-1080 Berlin, Germana DR. Por infanoj ĝis 14-jaraj la organizantoj anoncis konkurson de desegnaĵoj kaj pentraĵoj pri la temo "Mia kuracisto – mia helpanto". La verkoj devas esti A3- aŭ A4-formataj. La aparta adreso por la konkurso estas: D-ro Klaus Bochmann, Landambulatorium, DDR-9201 Bräunsdorf, Germana DR.

● **Radio:** Parte pro la okazigo de la Universala Kongreso kaj Internacia Junulara Kongreso en FR Germanio, Germana Esperanto-Junularo (GEJ) komencis kampanji por enkonduki Esperanton en la programojn de la mallong-onda radio-stacio Deutsche Welle. GEJ deziras, ke ĉiu helpu per sendo de nacilingvaj petoj por Esperantaj disaŭdigoj pri FR Germanio al: Deutsche Welle, Postfach 100 444, D-5000 Köln 1, FR Germanio.

Persone

● **Damjanov:** Fine de la pasinta jaro Veselin Damjanov turneis en Kanado. Tiel sukcesa estis la "velura" voĉo de la konata esperantista baritonulo, ke post koncerto en Pacifika Kolegio L.B. Pearson (ekster Victoria en Brita Kolumbio) ne sufiĉis por la studentoj la kunportitaj cent lernolibroj de Esperanto, kaj la rektoro pretis jam ĉi-jare starigi Esperanto-kurson, malgraŭ pli frua kontraŭstaro. Damjanov plurfoje koncertis ankaŭ en Vankuvero kaj Montrealo. Intervjuis lin la franclingva servo de la landa radio-stacio CBC. Li krome kantis por la kaseto *Veselin Damjanov koncertas en Kanado*. Ankaŭ unu-hora vidbendo de koncerto de Damjanov haveblas de Emistudio, 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

● **Miyamoto:** En la japana lingvo aperis en la numeroj 52 kaj 53 de la dumonata japana revuo *Syakai hyôron* (Socia revuo) unu ĉapitro, "Oosugi en Ŝanhajo", el la libro *La morta suito*, originale verkita en Esperanto de Miyamoto Masao.

● **Li:** En la 2a Internacia Memorkunveno "Ivan Flanjak", kiu okazis en Osijek, Jugoslavio, de la 22a ĝis la 24a de marto sub la temo "Esperanto en radio", prelegis pri la ĉinaj spertoj rilate la Internacian Lingvon en la dissendado s-ino Li Yuping, parolisto de la Esperanto-Sekcio de Radio Pekino.

Emistudio estas kanada Esperanto-kooperativo kies kunlaborantoj estas membroj de la familio du Temple

EMISTUDIO

Nova Produkto: Emistudio anoncas la UNUAN KASETON DE VESELIN DAMJANOV: TITOLO: VESELIN DAMJANOV KONCERTAS EN KANADO.

La kaseto prezentas operajn ariojn, popolkantojn, kaj kanzonojn ne troveblajn ĉe diskoj. Profesie registrita en teknike plej moderna studio kun kolora bildo de la kantisto, la kaseto havas falditan enfermaĵon kun tekstoj de la Esperantaj kantoj. La kaseto estas unika donaco por neesperantistoj, ĉar ĝi prezentas kantojn ankaŭ en la lingvoj franca, itala, rusa, angla kaj bulgara. Eminenta donaco por amiko, ĝuinda kaj melodia aŭskultado por vi de la plej fama kaj riĉa baritona voĉo en Esperantujo. Subtila pruvo al la ĝenerala publiko pri la beleco de Esperanto. Mendu ĉe Emistudio por $11,00 kan., aŭ ĉe UEA por 31,80 gld.

BUKEDO DE LA MONATO. Ĉiumonate EMISTUDIO donas premion al bona esperantisto. Gesamideanoj bonvolu sendi al Emistudio nomon de inda esperantisto kun klarigo kial tiu indas ricevi kaj premion kaj "bukedon". Tiu kun la plej granda kvanto de proponintoj gajnos. La premio estas la varo supre reklamita.

ROZBUKEDON KAJ PREMION GAJNAS ĈI-MONATE
BILL HARMON EL USONO

EMISTUDIO 765 Braemar Avenue, Sidney, BC V8L 3S1, Kanado.

Oficiala Informilo

NOVA DUMVIVA MEMBRO
Finnlando: S-ino A. Kanninen

DONACOJ 1985 (Gld.)
ĝis la 30a de aprilo

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Argentino: R.D. Morilla 181,00. Belgio: G. Pirlot 29,12. FR Germanio: B. Englund 100,00. Japanio: Okumura Rinzo 145,80; Nomura Tadatuna 72,90; Miwa Yositaka 72,90; Mine Yositaka 29,17; S-ino Isiguro Namiko 43,76; Kikusima Kazuko 27,07; Izumi Yukio 95,20. Nederlando: S-ino I.M.J. Dijkhoff-Lenze 100,00; E.J. Woessink 50,00. Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 31,80; Internacilingva Societo 31,80. Memore al s-ro A. Rodrigues Correia 610,10. Anonima donaco 5 000,00. Sumo ĉi-jara 8 062,24.

FONDAĴO ANTONI GRABOWSKI (en usonaj dolaroj): Britio: N. Salvesen 50. FR Germanio: H. Röllinger 50. Hispanio: Heroldo de Esperanto 100. Italio: A. de Giorgi 50. Kanado: W. du Temple 500. Nederlando: G.F. Makkink 100. Sumo ĉi-jara 2 800 us.$.

ĜENERALA KASO: Diversaj malgrandaj 20,00. Sumo ĉi-jara 3 581,74.

JUBILEA JARO: Anonime 1 230,00. Sudafriko: J. Semmelink 135,00. Sumo ĉi-jara 1 651,78.

FONDAĴO TEJO: Argentino: R.D. Morilla 181,00. Sumo ĉi-jara 431,00.

POR RENOVIGO DE LA DOMO: Por Ĉambro Onisaburo Deguti 10 000,00. Sumo ĉi-jara 22 145,04.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA

Nekrologoj

LUDVIG ANJER (1910-1985) mortis la 24an de marto en Oslo, Norvegio, kie li estis la delegito. Li lernis Esperanton en 1926. Inter liaj multaj postaj taskoj kaj oficoj li estis prezidanto de Klubo Esperantista en Oslo (1953-1957), estrarano kaj vicprezidanto de Norvega Esperantista Ligo (1959-1965) kaj estro de ĉi ties informa fako (1955-1982). De 1962 ĝis 1980 li estis komitatano de UEA. Li estis dumviva membro de UEA.

JEAN GUILLAUME (1904-1985) mortis la 20an de marto en Feucherolles, Francio. Li lernis Esperanton en 1927. Jam en 1938 li fariĝis la franca ĉefdelegito de Internacia Esperanto-Ligo, poste de UEA ĝis sia forpaso. Dum multaj jaroj li estis komitatano kaj estrarano de UEA. En 1974 oni elektis lin prezidanto de Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), de 1975 vicprezidanto. Li aparte agadis por la komisiono pri eksteraj rilatoj de UFE. Guillaume estis unu el la unuaj administrantoj de la kultura asocio de kastelo Grésillon kaj estis fondinto kaj la sekretario de Internacia Esperanto-Klubo Aŭtomobilista. En 1981 UFE elektis lin honora prezidanto. Li estis dumviva membro de UEA.

NANCIE DURHAM, lingvo-instruistino, forpasis la 10an de majo en Romford, Britio. Ŝi lernis Esperanton post sia emeritiĝo kaj poste instruis ĝin i.a. en Londona Esperanto-Klubo. Ŝi estis aparte konata pro siaj grupvojaĝoj al Ĉinio.

CLAUDE EDWIN MEAKIN (1897-1985) mortis la 19an de februaro apud Nottingham, Britio. Li partoprenis la 7an Universalan Kongreson en 1911.

ANDRÉE RAULT mortis la 14an de aprilo en Lisieux, Francio, kie ŝi dum multaj jaroj gvidis la lokan grupon.

VILHO SETÄLÄ (1892-1985), akademiano kaj Honora Membro de UEA, forpasis la 11an de aprilo en Finnlando. Ni publikigos ampleksan nekrologon en la julia numero.

BALDVIN B. SKAFTFELL forpasis la 19an de februaro en Rejkjaviko, Islando. Li estis aktiva esperantisto de 1932. Li tradukis en Esperanton la libron *Faktoj pri Islando* (1962) kaj belliteraturon prozan kaj poezian. Lia plej granda kontribuo al la Esperanto-movado certe

estis lia 479-paĝa *Islanda-Esperanta vortaro* (1963), kiu ankoraŭ estas unu el la plej profesie kompilitaj vortaroj ne nur al Esperanto, sed ankaŭ el la islanda. Li estis honora membro de Islanda Esperanto-Asocio kaj dumviva membro de UEA.

ALEX SOLAR (1902-1985) mortis en aprilo en Neasden, Britio. Dumviva membro de UEA, ŝi estis aktiva ano de Londona Esperanto-Klubo, kies pruntbibliotekon ŝi prizorgis dum multaj jaroj. Ŝi funkciigis ankaŭ la korektadon de koresponda kurso de Esperanto-Asocio de Britujo.

MARK STARR, Honora Membro de UEA, mortis en aprilo en Usono. Ampleksa nekrologo aperos en la julia numero.

ANTONIO TOMIĆ (1900-1985) forpasis la 1-an de aprilo en Medellín, Kolombio. Li estis unu el la pioniroj de la nacia Esperanto-movado. Li estis multjara membro de UEA.

LUCIE J. WEIJER (1909-1985) forpasis antaŭ nelonge en Ede, Nederlando. Ŝi lernis Esperanton ĉirkaŭ 1931 kaj siatempe estis la delegito en Lunteren.

La redakcio pardonpetas al s-ro Harold Fillingham, ke pro intermikso aperis lia nomo inter la nekrologoj en la aprila numero.

Anoncetoj

***Tarifo:** ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.*

Ideala feriejo por esperantistoj estas Gastejo Edmond Privat de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando.

Hola gesamideanoj! Se por vi Esperanto estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo, skribu al Info-Servo, Bismarkstr. 28, D-3550 Marburg, FR Germanio. Ni havas ion interesan por vi!

Fakulojn pri lumigado serĉas tiufaka terminologo por kunlabori pri Esperanta terminaro: S-ro Nils Utne, Jakobstien 15, N-7000 Trondheim, Norvegio.

Unika plurlingva kompara Esperanto-leksikono en 120-paĝa broŝuro. Afrankite: 22 frankoj aŭ 8 irpk. Ligue Française "Pro Unesco", 24 avenue Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Pĉk 16.233.37 C Paris.

Mi serĉas ĉiujn tekstojn pri komputiloj, informadiko ks. (nur prunte). Bv. sendi oferton al s-ro M. Vanden Bempt, Duisburgsestraat 12, B-3030 Leuven-Heverlee, Belgio.

Klasikaĵoj (trad. Goodheir): Platono: *Apologio, Kritono* £2,40; Eshilo: *Prometeo ligita* £2,60; Boecio: *Konsolo de la filozofio* £3,40; Eŭripido: *Trojaninoj, Ifigenia en Taŭrido* £3,40. Kardo, 16 Woodlands Drive, Coatbridge, ML5 1LE, Skotlando.

Alvoko al handikapitoj. Ni kun korpaj difektoj (surduloj, blinduloj, amputitoj, uzantoj de rulseĝoj ktp.) estas 15% de la homaro. Multaj el ni vivas mizere pro la konduto (intenca aŭ ne) de la nehandikapita publiko. Tial niaj problemoj estas grandaj.

Per Esperanto ni povas plibonigi nian vivon. Ni povas lerni unu de la aliaj trans landlimoj, kiel pli bone prizorgi nin mem kaj vivi kiel eble plej sendepende. Ni povas informi bonkorajn nehandikapitojn kiel helpi nin plej simple kaj efike. Kaj ni povas unuanime protesti, kiam oni mistraktas nin ĉe edukejoj, laborejoj aŭ surstrate.

Mia nova tasko estas reprezenti nin en la kadro de UEA. Ni handikapitoj devas esti partoprenantoj en ĉiuj agadoj: turismo, sciencaj aferoj, Universalaj Kongresoj, regionaj renkontiĝoj, la jubilea celebrado kaj diversspecaj simpozioj kaj konferencoj.

Tiucele mi intencas fari detalajn rekomendojn pri niaj bezonoj. Temas pri loĝejoj, necesejoj, manĝejoj, transportado, komunikado ktp. Ekster UEA eblas starigi rilatojn kun aliaj organizoj de handikapitoj.

Sed kio alia farendas? Mi petas viajn proponojn. Eĉ se vi ne havas proponojn, estus utile, se vi sendus al mi informojn pri vi: specifa(j)n korpodifekto(j)n, aĝon, personan situacion ktp. Tiel mi povos havigi al diversaj funkciuloj pli precizajn statistikojn pri ni. Inĝ. R. Kent Jones, Komisiito pri Handikapitoj, 452 Aldine – 501, Chicago, IL 60657, Usono.

"La mondo estas interesa, tial mi korespondas." S-ino Astrid Feuk, Söderby Höjden, S-137 00 Västerhaninge, Svedio.

Pasporta Servo aperis por 1985! Mendu nun la novan liston de gastigantoj. Ĝi proponas pli ol 600 gastigantojn el 53 landoj. Aĉeto de la libro rajtigas vin uzi la servon. La 64-paĝa libro inkluzivas dudekon da mapoj, sed kostas nur 5,70 gld. (plus sendokostojn) ĉe la Libroservo de UEA.

25-jara studento deziras korespondi kun esperantistoj de la tuta mondo: S-ro

Mohamed Dahmani, Rue 560 – No.16, Nedroma, Tlemcen, Alĝerio.

La kancerkliniko, la gazeto, kiu baldaŭ havos pli da kunlaborantoj ol da abonantoj! Kvar sinsekvaj numeroj + jara suplemento: 75 francaj frankoj. S-ro J. Le Puil, 5 Place Lavoisier (apt. 61), F-93380 Pierrefitte; pĉk. Paris 12 729 73 X aŭ UEA klik-g. Provekz. 3 irpk.

17-jara iranano deziras korespondi pri geografio, historio, naciaj ritoj. S-ro Karim Dehkarganiy, Magazin de D.Kh., Str. Khadivar, 5631 Bonab, Irano.

D-ro H. Rashidi, fondinto de Esperanto-movado en Afganistano, sciigas siajn amikojn, ke li nun vivas en Irano (adreso: Farsi Co., Torbate Jam, Irano). Novaj korespondantoj el la tuta mondo estas bonvenaj.

Instruisto, 55-jara, deziras konatiĝi kun amik(in)o por renkontiĝo en UK, Aŭgsburgo, aŭ vizito hejmlande, volonte de Azio. Norda Norvegujo. S-ro Heroldo Olsen, Boks 453, N-9001 Tromsø, Norvegujo.

URĜA ALVOKO: La sola espero rilate la solvon de la mondvastaj problemoj estas la reveno al la bibliaj instruoj. Por ricevi senpagan libreton kun fascinaj detaloj, skribu tuj al: **Internacia Biblio-Misio, 29 Plantation Road, Poole, Britujo BH 17 7LN** aŭ, se ekster Eŭropo al: **P.O. Box 373, Baronia, 3155 Vic., Aŭstralio.**

Esperanto en radio

Ĉiujn informojn pri radio bonvolu sendi al la redaktoro de ĉi tiu rubriko: s-ro Georges Larglantier, 29 bvd. Murat, F-75016 Paris, Francio. Ĉi-sube estas la elsendhoroj laŭ la Universala Tempo (UTC), antaŭe nomata Grenviĉa Meza Tempo (GMT).

ĈIUTAGE

05.30-06.00 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 48.90m (6135 kHz), 41.27m (7270 kHz). Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, Poŝtkesto 46, PL-00-950 Warszawa, Pollando.
11.00-11.25 Varsovio, 41.99m (7145 kHz), 31.50m (9525 kHz).
11.00-11.30 Pekino, 31.64m (9480 kHz), 25.86m (11600 kHz). Radio Pekino, Esperanto-fako, Beijing, Popola Respubliko Ĉinio.
13.00-13.30 Pekino, 25.67m (11685 kHz), 19.50 m (15385 kHz).
15.30-15.55 Varsovio, 41.18m (7285 kHz), 31.01m (9675 kHz).
16.30-16.55 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
19.30-20.00 Varsovio, 49.22m (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
20.00-20.30 Pekino, 40.16m (7470 kHz), 32.03m (9365 kHz), 30.10m (9965 kHz).
21.30-21.55 Varsovio, 200m (1503 kHz), 50.04m (5995 kHz), 49.22 (6095 kHz), 41.18m (7285 kHz).
22.30-23.00 Pekino, 30.93m (9700 kHz), 26.21 (11445 kHz).

LUNDE

16.30-16.40 Berno, 75.28m (3985 kHz), 48.66m (6165 kHz), 31.46m (9535 kHz). Svisa Radio Internacia, Esperanto-fako, CH-3000 Bern 15, Svislando.

MERKREDE

01.45-01.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 30.35m (9885 kHz), 25.16m (11925 kHz), 24.93m (12035 kHz).
03.45-03.55 Berno, 48.90 (6135 kHz), 30.85m (9725 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.60m (15303 kHz).
07.45-07.55 Berno, 31.38m (9560 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.27m (15570 kHz), 16.83m (17830 kHz).
10.45-10.55 Berno, 25.43m (11795 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.83m (17830 kHz).
13.15-13.25 Berno, 25.09m (11955 kHz), 19.27m (15570 kHz), 19.25m (15585 kHz), 16.87m (17785 kHz), 16.83m (17830 kHz).
15.15-15.25 Berno, 19.44m (15430 kHz), 17.07m (17570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).
17.15-17.25 Berno, 30.35m (9885 kHz), 25.09m (11955 kHz), 17.07m (17570 kHz), 16.83m (17830 kHz), 13.78m (21770 kHz).
22.00-22.10 Berno, 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.27m (15570 kHz).
22.45-22.55 Berno, 30.35m (9885 kHz), 24.93m (12035 kHz), 19.60m (15305 kHz), 19.27m (15570 kHz).

ĴAŬDE

05.00-05.15 Vatikano, 186m (1611 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 30.75m (9755 kHz), 25.61m (11715 kHz), 19.84m (15120 kHz). Radiovaticana, Esperanto-fako, Piazza Pia 3, I-00193 Roma, Italio.
16.30-16.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.

VENDREDE

18.25-18.30 Pécs, 344m (873 kHz) kaj M.F. 71.81 MHz, 71.03 MHz. Nur en junio, julio, aŭgusto. Radio Pécs, Esperanto, Pf. 200, H-7601 Pécs, Hungario.

SABATE

00.00-01.00 Sorocaba, 278m (1080 kHz). Rádio Clube de Sorocaba, Esperanto-redakcio, Rua da Penha 455, BR-18100 Sorocaba (SP), Brazilo.
16.30-16.40 Berno, ondolongoj kiel lunde je la sama horo.
20.00-20.20 Romo, 41.24m (7275 kHz), 30.90m (9710 kHz), 25.42m (11800 kHz). Radio Roma, Esperanto, C.P. 320, Centro Corrispondenza, I-00100 Roma, Italio.
Berno, diversaj horoj kaj ondolongoj kiel merkrede.

DIMANĈE

05.45-05.57 Vieno, 50.46m (5945 kHz), 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 31.14m (9635 kHz). O.R.F., Esperanto-fako, A-1136 Wien, Aŭstrio.
09.45-09.57 Vieno, 50.00m (6000 kHz), 48.74m (6155 kHz), 41.84m (7170 kHz).
19.00-19.10 Vatikano, 196m (1530 kHz), 48.47m (6190 kHz), 48.00m (6250 kHz), 41.38m (7250 kHz), 31.17m (9625 kHz), 31.10m (9645 kHz), 25.64m (11700 kHz), 19.84m (15120 kHz), kaj M.F. 93.0 MHz, 86.5 MHz.
21.45-22.00 Zagrebo, 262m (1143 kHz). Radio Zagreb, Esperanto-fako, YU-41000 Zagreb, Jugoslavio.
22.00-22.15 Rio-de-Ĵanejro, 214m (1400 kHz). Brazila Spiritisma Federacio, av. Passos 30, BR-20051 Rio de Janeiro (RJ), Brazilo.

ĜENERALA AŬDEBLECO

Tre multe da daŭraj aŭ ne-daŭraj aferoj povas helpi aŭ malhelpi la dissendadon de radiaj ondoj: vetero, sezono, parto de la tago, ĉirkaŭaĵo de la aŭskultanto, speco de ricevilo ktp. Tial ne eblas certigi, ĉu oni sukcesos klare ricevi elsendojn en sia lando aŭ mond-parto. Jen tamen kelkaj ĝeneralaj informoj:

a) Direktitaj ondoj. **Berno:** je la 01.45h al Centra kaj nordo de Suda Ameriko; je la 03.45h al Centra kaj Norda Ameriko; je la 07.45 kaj 10.45h al Malproksima Oriento; je la 13.15h al Oriento; je la 15.15h al Proksima Oriento; je la 17.15 kaj 22.00h al Arabio kaj Afriko; je la 22.45h al Suda Ameriko. **Pekino**: je la 11.00h al Japanio kaj Koreio; je la 13.00h al Sudorienta Azio; je la 20.00h al Eŭropo; je la 22.30h al Centra kaj Suda Ameriko. **Vatikano**: 9625, 11700 kaj 15120 kHz al Afriko je la 20.00h. **Vieno**: 5945 kaj 9635 kHz al okcidenta Nord-Ameriko.
b) Nedirektitaj ondoj kapteblaj longdistance: ondoj ne listigitaj ĉi-supre sub a) el **Berno, Romo, Varsovio, Vatikano, Vieno, Zagrebo**.
c) Nur loka aŭskultebleco por **Pécs, Rio-de-Ĵanejro, Sorocaba** kaj ĉiuj disaŭdigoj per modulita frekvenco (MF).



Aŭskultu kaj reagu

Pasintjare okazis 4 440 Esperantaj radioelsendoj, kiuj daŭris 1 899 horojn. Tio signifas, ke oni ĉiutage povas aŭskulti Esperanton per radio dum preskaŭ kvin horoj. Ĉiuj detaloj troviĝas en la ĉi-supra tabelo. Konsciu, ke tiuj elsendoj dependas de sia popularеco ĉe la aŭskultantoj, do **skribu foje al radio-stacio!**

LA EDUKA FONDAĴO CARSON



KELKAJ FAKTOJ PRI LA FONDINTO, CHUCK CARSON

En 1909, gesinjoroj William Carson konstruis turfan dometon, tridek kvin mejlojn sude de Lago Gull, Saskaĉevano, Kanado, kaj jaron poste akuŝistino helpis ilian fileton, Chuck Carson, spiri la stepan aeron.

La familio Carson travivis jarojn de povreco, sed eltenis per forta laboro kaj koopero ĉe la familia bieno. Fratoj, fratinoj kaj kuzoj, ĉiuj ludis kord-muzikilojn kaj fariĝis konataj kiel "La orkestro Carson".

Chuck edziĝis en 1954, sed ĉi tiu feliĉa periodo estis mallonga. Lia edzino mortis en 1965. En 1969 li ellernis Esperanton, kaj tuj fariĝis dediĉita esperantisto. En 1978 li donacis kvindek mil dolarojn de sia dumviva sparaĵo al la Kanada Esperanto-Asocio. En 1983 li konfidis sepdek mil dolarojn al Wally du Temple, "por la kreskigo de Esperantujo". Tiu donaco estas la koro de la Eduka Fondaĵo Carson. Chuck estas modesta viro, kiu preferas sukceson por Esperanto al persona rekono.

Chuck estas ekzemplo por ni ĉiuj. Ankaŭ vi havas okazon fariĝi aktiva partoprenanto kune kun Chuck kaj aliaj samideanoj en nova kaj moderna aliro al Esperantaj instruado kaj edukado.

LA KURATOROJ

W.G. du Temple jam de longe estas unu el la plej elstaraj esperantistoj en Kanado. Li estas prezidinto de la Kanada Esperanto-Asocio; li helpe aktivis por altiri la Universalan Kongreson de Esperanto al Vankuvero en 1984, kaj fariĝis prezidanto de la Loka Kongresa Komitato. En 1974 li fondis la Kanadan Esperantan Fondaĵon per konsiderinde granda persona donaco. Ges-roj du Temple havas internacian geedziĝon pere de Esperanto kaj iliaj filo kaj filino estas denaskaj esperantistoj. Li estas partposedanto kaj direktoro de "Golf-ludejo Ardmore" en sia hejmurbo, Sidney, Brita Kolumbio.

Anne Whittaker aktivas en la Kanada Esperanto-Asocio jam dum dek jaroj. Ŝi okupis diversajn postenojn, inkluzive de kasisto de KEA kaj komitatestro pri informado por la Universala Kongreso en 1984. Anne instruas en mezlernejo en Kamloops, Brita Kolumbio.

Allan Simon devenas el Aŭstrujo, kie lia familio havas profundajn radikojn en la Esperanto-movado. Lia avo, Otto Simon, estis la dua vicprezidanto de la unua Universala Kongreso de Esperanto en Bulonjo en 1905. Josefo, la patro de Allan, estis tre konata Esperanta instruisto kaj gvidanto. Allan vivas en Kalgario kun siaj edzino kaj du infanoj. Li estas prezidanto de "Compudoc Systems", komputor-programa kompanio.

CELOJ

Imagu komputorajn programojn por lernado de Esperanto... aŭ televidajn aŭdvidajn bendojn por edukaj elsendoj... aŭ someran studprogramon de Esperanto en ?????! Ĉiuj tiuj aferoj kaj pliaj povas esti financataj per la Eduka Fondaĵo Carson. Esperantistoj estas invititaj ĉerpi el la riĉaj provizoj de la fondaĵo por tiaj nov-iniciataj edukaj projektoj kiel

- komputoraj programoj,
- vojaĝ-studprogramoj,
- financa subteno por vizitantaj profesoroj,
- evoluigo de novaj lernolibroj, instruaj helpiloj kaj korespondaj kursoj,
- starigo de Esperantaj kursoj en lernejoj, kolegioj aŭ universitatoj
- Esperantaj kursoj por elsendado pere de radio kaj televido.

Kiel peti subvencion

La eduka Fondaĵo Carson bonvenigas proponojn kaj petojn por indaj projektoj. Se vi ŝatus prezenti peton, bonvolu sendi al la Eduka Fondaĵo Carson koncizan resumon pri la karaktero de la projekto kaj pri la proksimuma grandeco de la subvencio bezonata.

Komence, la Fondaĵ-direktoroj anticipas distribuadon de proksimume $12 000 jare kiel subvencioj. Tio sekurigos stabilan bazon kaj kontinuan kreskadon de la Fondaĵo.

DONACOJ

La EFC bonvenigas donacojn de esperantistoj de bonvolo. Pro tio, ke viaj donacoj estos aldonitaj al la kapitalo, kaj la intenco estas elspezi nur la gajnon, viaj donacoj porĉiame helpos la Esperantan movadon.

Grandaj aŭ malgrandaj, viaj kontribuoj kune kun la baza kapitalo de la Fondaĵo provizos urĝe bezonatan financadon por edukado. Oficialan peton oni jam faris por registri EFC kiel karitateman organizon, por ke kvitancoj por ebligi subtrahon de eventualaj enspez-impostoj povu esti donitaj.

Se vi havas kroman monsumon kaj subtenas la celojn de la Fondaĵo, ĉu vi ŝatus fari senperan donacon?

Bonvolu sendi viajn donacojn al la Eduka Fondaĵo Carson, P.O. Box 2159, Sidney, B.C., V8L 3S3, Kanado. ☎ 604-6563349.

INVESTOJ

Tiuj el vi, kiuj subtenas la celojn de EFC, sed pro diversaj kialoj ne povas donaci, tamen povas helpi. Vi povas investi vian monon en la Fondaĵon, kaj ĝui la avantaĝajn startkostojn (kutime nehaveblaj al malgrandaj investantoj) kaj la eminentan kreskon, kiun ni anticipas. Nuntempe, nia kapitalo estas investita en la Investfondaĵo Templeton, kiu historie montris mezan kreskon de 22% jare. Vi povas repreni vian investon kiam ajn. Vi povas decidi pri la procentaĵo de la profito, kiun vi deziras donaci al EFC, kaj kvitanco por impostaj celoj estos liverita.

Ĉu vi ŝatus, ke via mono laboru kaj por vi kaj por Esperanto?

TESTAMENTAĴOJ

Eble vi ŝatus inkluzivi la jenan frazon en via testamento:

"Mi testamentas la sumon de $..... al la Eduka Fondaĵo Carson (societo registrita sub la leĝoj de Brita Kolumbio), por helpi plenumi la ĝeneralajn celojn de tiu fondaĵo."

Noto: La advokatoj de la Eduka Fondaĵo Carson estas: Rosenberg, Rosenberg kaj Woodward, Advokatoj, 671J Market Hill Road, False Creek, Vancouver, B.C., V5Z 4B5, Kanado.

Por instruistoj:

P. Denoël:

L'Espéranto dans l'enseignement.

Reviziita dua eldono.

La aŭtoro diskutas la problemojn pri enkonduko de Esperanto en la francajn lernejojn. La indiferenteco de la plimulto de la instruistoj rezultas el kredo, ke Esperanto estas nur artifika inventaĵo kaj ke oni ne perdu tempon por tia infanludo.
La aŭtoro argumentas, ke la lernado de Esperanto profundigas la scion pri la gepatra lingvo. Esperanto povas esti ponto por ĉiuj lernantoj de aliaj fremdaj lingvoj. La sistemo de la lingvo permesas la formadon de novaj vortoj preskaŭ sen limo. La stabileco de la lingvo estas pruvita de 80 jaroj. Malgraŭ la rezolucio de Unesko por Esperanto, la lingvo preskaŭ ne ekzistas en la francaj lernejoj. Aktuale la parlamento pritraktas permeson por Esperanto-kursoj en la lernejoj. La broŝuro (en la franca lingvo) do venas ĝustatempe por varbi ĉefe inter francaj instruistoj. (Laŭ recenzo el *Monato*.)

Prezo: 100 belgaj frankoj + eventualaj sendokostoj. Mendu ĉe la Libroservo de UEA, ĉe la Libroservo de UFE aŭ rekte ĉe la eldonejo: Eldonejo & Librejo SONORILO, Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk, Belgio; ☎ (03) 827 24 05. La oficaj horoj: 08.30 ĝis 19.00.

Je ĉies avantaĝo

La Libroservo de UEA transprenis stokojn de Eldonejo TK/Stafeto. UEA ne nur **malaltigis multajn prezojn**, sed ankaŭ donas **rabaton de unu triono** (plus sendokostoj de 10%, kun minimumo de 5,00 gld.) por samtempa aĉeto de minimume tri ekzempleroj de samtitola libro, sendotaj al la sama adreso:

	gld.
Ĉu li bremsis sufiĉe? Johán Valano	12,00
Ĉu li venis trakosme? Johán Valano	18,00
Ĉu ni kunvenis vane? Johán Valano	21,00
Ĉu ŝi mortu tra-fike? Johán Balano	15,00
Esperanto aŭtodidakte Audrey Childs-Mee	24,00
Fabeloj de la verda pigo Louis Beaucaire	18,00
Hieraŭ – hodiaŭ – morgaŭ Bernard Golden	12,00
Hieroglifo Julia Pióro	9,60
Je la flanko de la profeto Italo Chiussi	30,00
Kaj la ceter' nur literaturo Gaston Waringhien ...	36,00
Kara diablino Douglas Boatman	9,00
Kumeŭaŭa Tibor Sekelj	9,00
Lidja Zamenhof Isaj Dratwer	9,00
Misio sen alveno John Francis	21,00
Primico Robindronath Tagor	9,00
Trofeoj José Maria de Heredia	9,00

Mendu ĉe la Libroservo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

LUADO ORION

Locations ORION

En ĉiu urbo indikita sur la mapo situas restadejo **ORION**. Ĝi ne estas hotelo, sed ĉiu konstruaĵo konsistas el ĉirkaŭ 75 malgrandaj apartamentoj, en kiuj troviĝas ĉio necesa por komforta restado. Littukojn, tualet-tukojn kaj viŝtukojn oni senpage prunte-donas dum la restado.

La 16 restadejoj **ORION** situas en la plej belaj regionoj de la lando. Oni povas lui por 8 tagoj en unu restadejo kaj por 8 tagaj aŭ pli en alia. Jen ebleco viziti Francujon, pagante nur vian loĝejon, kaj por manĝi vi pagos nur tion, kion vi aĉetos kaj mem kuiros.
Tiu rimedo estas malpli kosta ol ĉe hotelo – plie vi estas libera kiel en via persona loĝejo.

BIBLIOTEKA UNIWERSYTECKA KUL

Informas kaj rezervigas por iu ajn restadejo la UEA-delegito en SAINT-RAPHAËL: S-ro André Loisel, Tour Vadon, Rue Henri Vadon, F-83700 Saint-Raphaël, Francujo.